

BEOGRADA VERDA STILO

Jaro II

Beogrado, januaro-aprilo 2007

n-ro 1(2)

ESPERANTIGITAJ VERKOJ DE IVO ANDRIĆ

Tradukante por tiu ĉi numero la historian rakonton de Andrić pri la aŭstria ekstradicio de la greka kaj balkanlanda revoluciulo Rigas Fereos, venis al mi interesa ideo menciigi aliajn esperantigitajn verkojn de la nura serba nobelpremiito. Temas pri la tradukoj faritaj dum la vivo de la verkisto.

La plej malnova traduko estas tri fragmentoj el la *Maltrankviloj* (trad. F. Janjić) publikigitaj en "Literatura Mondo" (1924). Sekvas aliaj prozaj tradukoj: *La ponto super Ĵepa* (trad. B. Vančik) en "La Suda Stelo", 1948; *Vintre*, "Progreso" (1956), trad. Ž. Ivanović, el la kolekto *Sub la karoeneto*; *La palisumo*, fragmento el la romano *La ponto super Drino*, (trad. D. Kralj), en "La Suda Stelo" (1956), kaj *Olijacianoj*, "Nia vivo", 3, 1955, p. 21-41; traduko estas presita per la Brajla skribo.

Fragmentojn el la *Ex Ponto* tradukadis J. d'Agreve (I. Rotkvić), du foje, en "Balkana Konkordo", Sofio 1931, kaj "Literatura Mondo", 1932. Partojn el la *Ex Ponto* tradukis ankaŭ J. Velebit en "La Nica Literatura Revuo" (1957) kaj P. Stefanović en la "Progreso" (1957).

Kompletan bibliografion de tiuj ĉi tradukoj la leganto povas trovi en la *Leksikono de jugoslavaj verkistoj* (Leksikon pisaca Jugoslavije, I).

d-ro Miodrag Stojanović

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word- aŭ PDF-dokumento
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala prozo

PRI UTILECO DE ESPERANTO

(Memore al nia de longe forpasinta s-ano Milivoje Pavlović, elstara esperantisto)

Estas konate kaj ŝajnas esti tute nature kaj logike se oni ŝatas aŭ malŝatas ion depende de ĝia valoro. Kaj la valoroj kreskas aŭ malkreskas konsiderante utilecon aŭ malutilecon de iu objekto aŭ afero.

Nun, ĉi tie, en la kadro de sinceraj zorgoj pri la INTERNACIA LINGVO ESPERANTO, mi volas provi tuŝi la problemon de utileco de Esperanto.

Pasis jam pli ol kvindek jaroj de kiam mi komencis partopreni en larĝa kunlaboro kun tiam konataj esperantistoj, ĉar jam en la jaro 1932 mi estis delegito de Universala Esperanto Asocio kaj mi petas la leganton kredi, ke mi vere longe observis kaj spertis la internaciajn rilatojn. Tial mi ĝuste pro tio decidis skribi pri la utileco de Esperanto.

Mi eklernis Esperanton la 13-an de novembro 1930 kaj jam en 1931 mi korespondis kun Julio Baghy (el Budapeŝto – Hungarujo), Raymond Schwartz (el Parizo – Francujo), Edmond Privat (el Ĝenevo – Svislando) kaj en 1932 kun doktoro Anakreon Stamatiadios (el Ateno – Grekujo) kaj Paul Bennemann (el Leipzig – Germanujo). Mi tiam estis vere stulta junulo ĝojanta pro sukceso povi korespondi kun diversaj landoj kiuj min interesis pli ol personoj – homoj, pri kio mi nun hontas. Sed, kvankam stulta tiam, mi tamen spertadis veran konon de granda valoro de Esperanto kaj mi klopodos pruvi ke la valoro de Esperanto estas en ĝia **intenacia uzado**.

Jen du ekzemploj el mia vivo:

En aŭgusto 1932 mi estis en la plej malnova slava monaĥejo Sankta Naumo, ĉe la suda bordo de lago Ohrid. Tien ofte venadis eksterlandanoj kaj mi kelkfoje servis kiel interpretisto al Francoj, Italoj, Grekoj, Bulgaroj kaj Rusoj. Sed venis unu Aŭstriano deziranta verki kelkajn raportojn por Viena semajna ilustrita gazeto. Sed li ne trovis interpretiston por germana lingvo. Mi provis interkompreniĝi kun li, sed ne estis eble, kvankam li parolis, krom la germana lingvo, ankoraŭ hungare, finne, svede, dane, nederlande kaj angle. Do li konis nordajn eŭropajn lingvojn kaj mi la sudajn. Praktike ni du sciis preskaŭ ĉiujn ĉefajn lingvojn de Eŭropo. Sed tamen ni ne povis konversacii. Vere stranga kaj ridinda situacio. Sed okazis miraklo. Jes, vera miraklo. Post duhora turmentado kaj eĉ kolerado kaj ridado, mi vidis sub la madlekstra refaldo de lia jako grandan verdan stelon. Mi senkontrolite ekkriis: „Ĉu vi estas esperantisto?“. Li ekgapis kaj elbuŝigis: „Jes, sed ĉu ankaŭ vi?“ Mi

ne intencas priskribi tiun strangan konatiĝon, sed nur mi diros ke li restis en la monaĥejo tri tagojn kaj fotis kaj priskribis multajn interesaĵojn.

Eble tio estus interesa legaĵo, amuza kaj propaganda, ĉu ne?

Dua ekzemplo:

Ekestinte paroĥestro en montara vilaĝo mi eksciis ke antaŭ dek kvin jaroj edzĝinta paroĥano lasis la novedzinon post du monatoj kaj iris eksterlanden por gajni monon. Sed jam naŭ jarojn la edzino ne scias lian adreson. Mi skribis petleteron al delegitoj de UEA aldoninte la lastan konatan adreson. Post nur 28 tagoj mi ricevis informon ke la serĉata malaperinto vivas en Belgio kun laŭleĝa edzino kaj havas du infanojn. La gepatroj de la forlasita edzino transdonis la aferon al la ministerio de eksteraj aferoj kaj la kulpulo en Belgio estis enkarcerigita. Lia eksedzino laŭleĝe reedziniĝis, kaj mi estis laŭdita kaj en mia dokumentaro en la rubriko pri lingvoscio estis enmetita noto: „konas kaj uzas perfekte internacian mondhelpingvon ESPERANTO“ kvankam ĝis tiam miaj superuloj malamamis min pro mia simpatio al Esperanto.

La tria ekzemplo ne estas el mia vivo:

En horloĝista laborejo en Svetozarevo eksplodis bareleto da ĉasista pulvo. Ĝia posedanto, ĉasisto, perdis la vivon kaj la laborejo kun la tuta ilaro estis disrompita. La horloĝisto estis malespera sen vivrimedoj. Lia fianĉino, tiam fraŭlino, Dušica Grujić, jam konata esperantistino, anoncis en „Heroldo de Esperanto“ peton por helpo. Baldaŭ troviĝis preskaŭ eĉ pli bona ilaro kaj post mallonga tempo la laborejo refunkciis. La gefianĉoj geedziĝis kaj la geedza paro Dodić nun havas maturan filon.

Eble la geaŭskultantoj jam faris konkludon pri la utileco de Esperanto. Sed mi ne celis nur tion. Mi volas nun kompari la agadojn de la silentantaj utiligantoj de Esperanto kun la agadoj de tiuj kiuj laŭte fanfaronas, ke ili lernis Esperanton kaj, ke ili havas diplomon „A“, „B“ aŭ „C“. Tial bonvolu aŭdi fabelon pri spikoj:

Kampano iris kun sia fileto por vidi ĉu la tritiko maturas.

– Paĉjo, – diris la knabeto – kial kelke da spikoj tiel malalte kliniĝas kaj aliaj siajn kapojn levas alte? Ili eble estas la plej bonaj, kaj aliaj, kiuj malleviĝas certe estas netaŭgaj.

La patro deŝiris kelkajn spikojn kaj diris:

– Rigardu, tiuj spikoj, kiuj modeste kliniĝas, estas plenaj je greno, la aliaj, kiuj rektiĝas fiere, estas malplenaj.

Al mi ŝajnas, ke multaj lernintaj kaj levantaj fiere la kapojn kaj montrantaj insignojn kaj diplomojn similas al la malplenaj – sengrenaj spikoj.

Do, ne forgesu ke Esperanton oni devas uzi nur kun plena estimo kaj ne kaŝi ĝin en multekosta skatolo, ĉar ĉiu lingvo vivas nur uzate kaj ne laŭdate.

Milivoje Pavlović

Originalala poezio

Dimitrije Janičić (serb- kaj esperantlingve)

МОЛБА

Године ми избраздале лице
не личим на себе,
звезде ми више
не сијају у очима.

Друмове нуде широки свет
а у мени умрла жеља.
Време свођења рачуна
свакоме стигне.

Из торбе мога трајања
вадим тек крпице
некадашњег дубоког разумевања.
Остао ми само додир мртвих успомена.

Пусти ме да уђем у твоје снове
– тако сам усамљен.

РЕТО

Al amiko F-Ero

La jaroj sulkigis mian vizaĝon
mi ne similas al mi
la steloj ne plu brilas
en miaj okuloj.

La ŝoseoj ofertas al mi larĝan mondon
sed en mi mortis deziroj.
La tempo de farado de vivbilanco
al ĉiuj alvenas.

El saketo de mia vivdaŭro
mi elprenas nur ĉifonetojn
de iama profunda kompreno.
Al mi restis nur tuŝo
de mortintaj rememoroj.

Lasu min eniri en viajn sonĝojn
– ĉar mi ja estas tiel sola.

Vladimir Kirda Bolhorves

ALVOKO DE L' ENAMIĜINTO

Donu al mi manon, kaj kun mi ekiru.
Malantaŭ ni restu la stratoj
kaj mallumaj haloj, tuta ĉi-urbo,
venenita formikejo.
Per unu kiso mi ornamos vian frunton.
Iros ni, pli kaj pli solecaj,
ĝis ni postlasos eĉ lastan vilaĝon.

Ni iĝados malpli grandaj.
Kaj unu tardan posttagmezon,
perdinte ĉion, ekdormos je herboj.
Vespere, rigardante la bluan cindron
kiu restas post la falo
de la arda orglobo, ni trankvile
je l' burĝono fermos la pordon.

Noktmeze, je lunlumo,
mi kisos viajn nudajn piedojn, kie Pegaz
al la floro direktas sian flugon,
kaj matene ni, nudaj, nin banados en rosguto.
Fore de ĉiuj, aliaj ol ĉio, protektitaj
kontraŭ malaj fortoj regantaj en *tiu* mondo,
ludados sub la kupolo de nia ĉielo.

Venu. Ni estos du grajnetoj
da stela polvo. Fine de l' mondo
atendas nin herboj protektantaj,
kaj pejzaĝoj de la kosma silento.
Ho, venu! Ni estos naivaj kaj feliĉaj.
En brakumo ni fariĝos unuopo,
fariĝos nevideblaj – senkorpaj!

VIVA VI ESTAS

En artan formon
mi metis vin
ĉar mi ne plifridiĝis!

Jen, vidu, amo mia,
kiome mi ploris,
kaj poste mi nur svingis...

Mi svingadis dume...
kaj vi forsvingadis,
okulumante,
kaj el tiu distanco
rigardetis min.

Per okuletoj salutis min,
per okuletoj tiuj
la plej belaj!

Jen kia estas mia amo vigla,
tiel granda!
Jes, amas vin mi

Memore al Greta

NEFORGESEBLA GRETA



Margarethe Greta Stoll forpasis sabaton la 10-an de februaro, ses tagojn antaŭ la 95-a naskiĝdatreveno. Ŝi estis emerita drama aktorino, naskita la 16-an de februaro 1912. Ŝi vivis, lernis kaj studis en Beogrado, Lucerno (Svislando) kaj Parizo kaj aktorin en diversaj teatroj en nia lando.

En la jaro 1953 ŝi esperantistiĝis en Beograda Esperanto-societo „Radomir Klajić“ kaj estis aktiva en societa vivo de kelkaj E-societoj kaj en la landa E-movado. Ŝi gvidis Esperanto-kursojn, kiuj estis eksterordinaraj, ĉar ŝi dum la kursoj aktorin kaj kantis. Greta estis ĉiam gaja, dum societaj aranĝoj ŝi gitarludis kaj kantis. Ŝi senlace laboris por aperigo de diversaj E-gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj kaj eĉ kelkajn jarojn estis la ĉefredaktorino de „La suda stelo“. Krom tio, ŝi organizadis E-ekspoziciojn kaj partoprenis en organizado de E-kampadejo kaj ekskursoj. Pro sia laboro ŝi estis distingita per Ordeno por meritoj.

Greta verkis en Esperanto poemojn, novelojn, teatraĵojn kaj por siaj poemoj estis premiita dum jugoslaviaj festivaloj kaj kongresoj. Ŝi tradukis pli ol 120 poemojn por libro „Antologio de la serba poezio 1200-2000“, kiun ŝi eldonis post la forpaso de sia edzo samideano Srdj Arandjelović.

Ŝi estis membrino de UEA kaj SAT. Okaze de la pasintjara kongreso de SAT en Beogrado (2006) aperis ŝia poemaro „Miozoto“. La kolekto enhavas 61 poemojn kaj du dediĉojn de aliaj poetoj al samideanino Greta. La enhavo de la kolekto konsistas el diversaj poemoj: amaj, pensoriĉaj, ŝercaj, patriotaj, satiraj kaj elegiaj, sed ĉiuj sendas la saman mesaĝon: ĉi tiu vivo kaj ĉi tiu mondo estas belaj, se ni nur scipovas vidi kaj senti tiun belecon.

Greta estis bonkora, laborema kaj bonhumora, bonega esperantistino kaj poetino, ŝi laboris ĝis la lasta tago por nova libro dezirante eldoni siajn prozaĵojn.

Ŝi en nia memoro restas kiel neforgesebla esperantistino.

Etelka Kiss-Jakupović kaj Dimitrije Janičić

LA MIOZOTO

En strata polvo kuŝas bela floro
Malgranda, blua kun flaveta koro.

La tutan tagon homoj tie pasis,
Sed tamen la floron en polvo lasis...

Ĝi floris frue en iu ĝardeno
Kaj roso ĝin kisis en la mateno.

Tre ĉarme la eta floro bluis
Per ora koro la vivon ĝuis...

Sed, foje kiam krepusk' alvenis
Virina mano floreton prenis.

Je rememoro elkore donita
Ĝi malproksimen estas forportita...

Tempo pasadis... Velkis la floro.
Lante paliĝis pri ĝi rememoro...

Nun forĵetita kuŝas sur la tero
La forĵetita flor' de l' primavero.

Pluvego venas Ĉu spit al sorto
Memoro restos pri la miozoto!?

1956



AL LA NEGRINO

Al vi
Nekonata virino
El malproksima lando
De sur „nigra kontinent’ ,“
Al vi
Nun flugas
Mia amo
Kaj profundestima sent’.

Al vi
Ho, edzino malfeliĉa,
Kies doloran vizaĝon
Surbilde
En iu gazeto vidis mi –
Ho, kara samsentulino,
Sur kies lipoj
Ankoraŭ eĥas
Dolora kri’.

Al vi
Mi volus tiom multe diri!
Kredu,
Ke ne nur via estas
Nuna via dolor’!
Kaj ke ne estas
La sama,
Ke ne estas kruela
Ĉiu „blanka“ kor’.

Al vi
Montri mi volus
Kaj pruvi la amon
Ne nur per
Nuda vorto...
Mi helpi volus
Sindone,
Elkore,
Per tuta mia forto.

Al vi
Sub kies koro
Kuŝas la homa ido
Same
Kiel sub la kor'
De ino alia,
Kaj kies vivorolo
Komuna estas
Al la mia...

Al vi
Kies edzina sento
Kaj
Amo patrina,
Egalas al tiu
De ĉiu ino,
Kiu por estaĵ' kara
Luktas pene
Ĝis vivofino –

Al vi
Kies parulon
Oni mortigis
Ĉar por la libero
Arde batalis li ...
Ho, nekonata vidvino,
Al vi
Larĝe la manojn
Etendas mi.

Al vi
Kies popolo
Lante,
Sed persiste,
Vekiĝas
El dormo letargia,
Al vi ĉiuj
Nun flugas amo
Kaj helpopreto
De la tuta koro mia!

Tradukoj

Ratko Lukenić

Homamanto

Falsa estas ĉi mondo
Ĵurnaloj skribas pri la paco
Libero, justeco kaj egaleco
Sed ĉiutagas novaĵoj pri milito
Pri malsato, malsanoj kaj pri armigado...

Por homamantoj
Plu ne ekzistas
Loko inter homoj!

Esperantigis: Tereza Kapista



ПИСМО ВЕЧНОМ ОВИДИЈУ

Уочи мартовских ида, увек се радо сетим
Августусе: Тебе
и Твојих посланица са Понта. Отворено
говорећи, немаш
Ти за чим жалити, драги мој пријатељу.
Морски ваздух,
тамо у Томима, како чујем - оздрављује.
Сарматским
луковима у лову, досаду убијаш. Вежбама
говорништва, вином и
лепим Да~анкама, доколицу прекраћујеш.
Чиме још да
Те утешим? или обрадујем? Град, у који се
никада нећеш вратити,
све више личи, веровао или не, на сатанин
рај а књижевност,
што рече наш Милош, на турниру грбаваца.
Поодавно је
песмотворство постало пуки занат, и то
у изумирању. Скоро
мртвим, тим језиком говори још шачица
изопштених. Готово
да и не знам ниједног песника који не личи
- да ли се изненађујеш? -
на Тедовог гаврана. Чим прослове о љубави,
светом заплива још
једна ајкула. Веруј да ни мени, небопарном орлу,
како подсмешљиво
волиш да ме називаш, није нимало лако. Колико
сутра, ако не
већ данас, поезију више нико нити пише нити
чита. Читају се, зато,
СМС поруке или телетекст, радо и незајажљиво.
Толико је још

од преголемог царства песништва - преостало.
И шта би Ти,
данас-и-овде, уопште радио? Смишљао рекламне
слогане за ноћ
рекламождера? Ординирао у некаквој књижевној
агентури? Животарио
у тужној редакцији месног таблоида? Веруј ми,
часни наш
и вечни Овидије, добро је Теби тамо у Томима.



Milan Orlić

LETERO AL ETERNA OVIDIO

Antaŭ la martaj idaoj, ĉiam mi volonte rememoras
vin, ho, Aŭgusto,
kaj viajn epistolojn de Ponto. Sincere dirite
vi havas neniun kialon
pro io ajn bedaŭri, kara amiko mia.
La mara aero
tie ĉe vi, en urbo Tomi, kiel mi aŭdis - sanigas.
Per la sarmataj
sagoj enĉase, enuiĝon vi mortigas. Per retorikaj
ekzercoj, per vino
kaj kun belaj dachaj virinoj, la nenifaron vi tranĉas.
Per kio ankoraŭ
mi vin konsolu? Aŭ ĝojigu? Urbo en kiun vi
neniam revenos
pli kaj pli similas, kredu min, al la Satana
paradizo, kaj la beletro,
kiel diris amiko nia Miloš*, al turniro de ĝibuloj.
Jam de longe
la poemkreado iĝis simpla metio,
sed metio malaperanta.
Per la lingvo poeta, preskaŭ mortinta, apenaŭ parolas
areto de izoluloj.
Mi preskaŭ konas nek unu poeton kiu ne similas
- ĉu por vi surprizo? -
al la korvo de Ted.** Tuj kiam ili elparolas pri l' amo
la mondo riĉiĝas
per nova ŝarko. Kredu ke ankaŭ mi, la ĉielgrata aglo,
kiel primoke
vi kutimis min nomi, ne sentiĝas bone. Eble morgaŭ,
se ne jam hodiaŭ,
la poezion nek iu verkos nek legos.

* Miloš Crnjanski (1893-1977), unu el la plej elstaraj serbaj poetoj

** Ted Hughes (Hjuz, 1930-1998) la angla poeto en kies poezio dominas bildoj de korvoj.

Nun oni legas
interretajn mesaĝojn, teletekstojn, volonte kaj voreme.
Nur tio, bedaŭrinde,
restis de l' iama grandega reĝlando poeta.
Sed, vere, kio
nun kaj *ĉi tie* restus por vi fari? Ĉu krei reklamojn
por la festo-nokto
de la reklam-forvoruloj? Enuiĝi en ia literatura
agentejo? Vivaĉi
en morna redaktejo de loka ĵurnalaĉo? KREDU min,
vi dignoplena
kaj eterna Ovidio, fartas vi bone, tie, en urbo Tomi!

el la serba
Zlatoje Martinov



Simo Matavulj (1852-1908)

BAKONJA FRAT'-BRNE **(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(dua parto)

Ive aŭ Korpulentulo, "duenaskita" filo de Hirtulo estis dekdujara tia kia estas la alia bonkreskanta knabo de dekkvin jaroj, rozvanga kaj fortika, vigla, gaja, kaj preskaŭ ĉiam preta al "friponado". En ŝtonĵetado li superadis eĉ la malpli junajn ol li, saltsuperadis kaj en kurado venkadis ĉiujn siajn samaĝulojn, povis grimpi sur arbon kiel sciuro, povis ekrajdi senselan ĉevalon, krome li havis la kuraĝan koron por interbatiĝi eĉ kun iu lipharulo. En tuta Zvrljevo ne ekzistis infano ne havanta signon de Korpulentul-mano, sed ankaŭ lia korpo estis plena de sangmarkoj, sed li neniam fuĝis al la patro por ke li defendu lin, male li sola venĝadis sin laŭpove kaj suferis heroe. Sed plejparte diferencigis lin de aliaj infanoj lia firma volo; kion ajn li intencus, tion li farus, se eĉ cent baroj ĝenus lin; kion li volus kaŝi, tion li ne malkovrus, eĉ se vi lin torturus. Kelkfoje li parolegis, kelkfoje li fariĝis kvietita kiel firmŝtono.

Tio estas stranga, sed pli strange estis ke Vespulino amis Korpulentulon pli multe ol Hirtulon kaj Kadukulon kaj du filinojn, Vitriolon kaj Kurbulinon. Ŝi pli multe taksis unu lian fingron ol iun ajn el ili, kaj pretis forbedaŭri ĉion por lia bela kapo. Ŝi furiozegis kiam la fraŭlinoj nur iomete kulpiĝadis, kolerpikis ĉiujn domanojn kiam ŝi estis kolera; male, al Korpulentulo ŝi ne nur neniam diris maldolĉan vorton, sed ŝi protektis lin ĉiuokaze, eĉ kiam lia friponado estis tro evidenta. Kiom da fojoj Hirtulo incitegiĝas kaj saltas forbati la "malfeliĉan infanon", sed Vespulino tiam hirtiĝas je la edzo, ĝuste kiel kovkokino defendanta kokidojn. Kaj ni jam diris supre ke la fortega Hirtulo timis la malfortikan Vespulinon! Diablo komprenu kiel tio povis esti, sed vi komprenas ke pro tio estis facile al la knabo diskruriĝi kaj mokeme aŭskulti la patrajn riproĉojn.

Post Korpulentulo, la plej kara estis al la patrino la post-ina naskito Ventregulo (aŭ Roko), kvarjara infaneto. Post kiam Hirtulo finploradis, ŝi antaŭenigadis al si Ventregulon kaj jene al li karesparoladis:

Jen kiu estos nia pastro, nia episkopo, nia krono!... Ĉu vi volas, mia baraktemulo? Mi estas malg'anda, malg'anda, malg'anda, poste mi iĝos g'andeta, g'andeta, kaj iĝos episkopo, episkopo, episkopo! Animeto patrino, koro patrino, fiero mia!... Poste ŝmac! ŝmac! ŝmac! ŝi forkisadis lin kaj luladis ĝis lia endormiĝo.

-Dio ĉion al bon' rektigos! - diradis finfine la vilaĝestro, post longa pripenso.

-Ja kiu alia ol Dio! – respondadis Vespulino, post kio ili enlitiĝadis.

Longe tiel daŭris subtegmente de la plej maljuna Rapidmanĝulo, kaj tiel estus ankoraŭ daŭronte, se ne okazis io.

III ELEKTO

Estis aŭtunkomenco. Iun labortagon, tuj post la sunsubiro, Hirtulo kaj liaj ariĝis ĉe la manĝableto, sur kiu fumis griaĵo en ligna pelvo. La nordvento forte blovis. Antaŭ ol sidiĝi por manĝi, ili ĉiuj laŭtigis unuvoĉe "Patro nia" kaj ĝuste eldiris "venu regno via", kiam la subtila Korpulentulo-orelo, tra la tuta ventbruego, aŭdis ĉevalan piedfrapadon, kaj kurinte al la pordo, li ekkriis:

Frat'-Brne!!

Hirtulo kaj Vespulino elkuris el la korto kaj vidis – la unua kion ili vidis estis la plej dika parto de la pastro, ĉar la flavĉevalo turnis la postaĵon al la pordo, kaj la pastro kliniĝis al la flavĉevalo pene tirante la dekstran piedon el la piedingo. Stalisto, iu brunhaŭta junulo, vestita Kotor-mode, kun paro da pistoloj en leda armzono, bridtenis la ĉevalon. Hirtulo aliris, eltiris la piedon de la pastro kaj ĉirkaŭinte lian larĝan talion, helpis lin deĉevaliĝi. Tiam la fratoj kontraŭkisis sin reciproke dufoje. Vespulino mankisis la bofraton kaj Korpulentulo albuŝigis la ŝnuregon per kiu sin ĉirkaŭigas la franciskanoj.

Frat'-Brne estis tutkapon malpli granda ol lia frato, sed se Hirtulo razus la lipharojn, kaj se ŝvelus liaj vangoj, kolo, ventro kaj postaĵo, li estus samkiel frat'-Brne.

-Endomiĝu, ni ja frostegas! – diris la pastro kaj aldonis de sur la sojlo: laŭdata Jesuo!

-Ĉiam Jesuo kaj Maria! – respondis Hirtulo kaj Vespulino. Ŝi konfuzita ekvagis tra la domo, ne sciante kion fari.

-Kaj kiel, kiel? – demandas la pastro.

-Dank' al Dio kaj sanktega Virgulino, ne estas malbone! Jen, malsato ne ekzistas, malsano forestas, kaj oni vegetas, - diras la estro Hirtulo.

-Nu, bofratino, metu iom da drapo sur la seĝon! – diris frat'-Brne.

Vespulino sternis "ornamhavan" drapon.

-Ti-el! – diris la pastro. -Nun deprenu miajn botojn kaj metu ŝtipon sub miajn piedojn. Ti-el! Nun bruligu kandelon!

En ĉiu katolika domo troviĝas po unu vakskandelo, benita je "Kandelfesto", kaj konservata en la domo por la uzado al mortantoj. Vespulino krucsignis kaj ekflustris:

-Indulgu, Dio kaj kandelfestpatrino! – poste ŝi bruligis bruligis la kandelon kaj ekingis ĝin en la glason kun greno.

Brne apogis la ŝultrojn kontraŭ rondodorso de la tripieda seĝo, interplektis la fingrojn surventre kaj volvis unu dikfingron ĉirkaŭ la alia.

La stalisto enportis dusakon, kaj Korpulentulo la selon.

-Mi ne scias kion fari! – diris Hirtulo gratante sian kapon – ĉu vi volas ke mi buĉu kokineton?

-Dio kun vi! – respondis la pastro. –Ĉu vi tutkonscias? Ĉu ne estas hodiaŭ vendredo... ne pensu vi pri la vespermanĝo... kie estas la ceteraj infanoj?

-Ili hontemas, kaj kaŝis sin malantaŭ la teksilon – diras la dommastrino.

Jen vespermanĝu, dio vin vivigu! Stefano, donu ke ni ankaŭ manĝetu. Vi ankaŭ manĝos kun mi Jeronimo!

La dommastrino metis sian pelvon surplanken, dum la manĝotablon ŝi alportis antaŭ la bofraton, kaj tiam alvenigis Kadukulon, Ventregulon, Kurbulinon kaj Vitriolon por kisi la ŝnuregon de la onklo.

Stefano eltiris el la dusako unu nodon, envolvitan per papero, kiun li elvolvis. Tio estis tri bakitaj trutoj. Poste li eligis dekon da ovoĵoj, unu fromaĝrondon, macon, forkon, tranĉilon kaj glason.

Hirtulo, gratante senĉese sian kapon, verŝajne ekpensis: "Facile estas tiel fasti!"

-Venu, Jeronimo, sidiĝu, - diras frat'-Brne.

-Sed mi... tio... kiel... – komencis li heziti.

-Venu, venu! Sidiĝu ankaŭ vi Stefano, kun ni!

Kaj ĉiuj tri ekmanĝis. Ekstere la vento sporade plifortiĝadis, skuante la pordeg-klapegojn. Ŝafhundo de Hirtulo hurlis en la tegmentaĵo. Vespulino flustris kun la infanoj, dume Korpulentulo forgesis la manĝadon kaj gapis al onklo.

Korpulentulo pensis kiel bele estas pastri! Kiel bele estas rajdi bonan ĉevalon, kunirigi staliston, porti puran tolaĵon, dormi sur molaĵo, en sekeco kaj varmeco, manĝi viandon kaj fiŝon, trinki vinon kaj kafon, ĝuste ĉiun tagon! Kiel bele estas ke oni salutadu vin ĉie! De malproksime viroj deprenas ĉapojn, kaj virinoj kliniĝas! Kiu ajn alproksimiĝas al vi, tiu kisas viajn manojn kaj zonŝnuregon!...

Korpulentulo profunde eksuspiris.

-Kio okazas al vi? Kial vi ne manĝas? – demandis la patrino.

Korpulentulo ekskuis la kapon.

Iom poste malfermiĝis la pordo kaj eniris aro da Jerkoviĉoj.

La unuaj eniris Hokstango kaj Nazsonulo. Post ili Manlamulo kaj Traserĉulo kun du siaj fraŭloj. Poste kvin Murmurul-anoj: Ronkulo kaj Nazakataro kun siaj tri filoj.

Unu post la alia ĉiuj salutis: "laŭdata Jesuo!" kaj ĉiuj kisis la manojn de la pastro, post kio ili sidiĝis.

-Kiel, Jure? Kiel, Bare? Kiel, Ŝime? Kiel, Vice?... Kiel ĉiuj? – demandas frat'-Brne.

-Dank' al Dio kaj al Virgulino, ni fartas bone, kaj penvivas kiel ni povas – respondis Hokstango nome de ĉiuj.

-Ti-el! – diris la pastro kaj daŭrigis manĝi.

Frataranoj eligis pipojn kun mallongaj lignotuboj kaj ekfumegis.

Post kiam ili finrigardis "frat'-Trogulon" (tio estis kromnomo de Brne), iliaj rigardoj ariĝis je la fajrejsupro, kie pendis kelkaj pecegoj de virŝafaj kaj porkaj interripaĵoj. Unu fraŭleto de Murmuruloj, rigardante tion flustris al la plej proksima:

-Rigardu, mi petas vin, dian trezoron ĉe la lepra Hirtulo!

-He, se la tegmento ne estus ŝtonplatigita, aŭ se almenaŭ kamentubo estus pli larĝa! – respondis tiu suspirinte.

Post kiam tiu triopo formanĝis fiŝojn, la dommastro prenis de sur la bretaro lignan kruĉon, ekblovis en ĝin kaj subite ekskuis la kapon, ĉar milionoj da polvoj elflugis el ĝi. Korpulentulo aliris la patron kun vakskandelo, kaj ambaŭ foriris al barelejoj, estantaj malantaŭ la teksilo. La kandelo estingiĝis, pro kio Hirtulo diris:

-Bruligu ĝin ree, diablo ĝin prenu!

-Prenu ĝi vian menson, vira besto! – diris silente Vespulino – ĉu oni la festkandelon destinas al diablo?

-Prave vi diras, bofratino! – diris Ronkulo. – Peko estas insulti la kandelon eĉ se ĝi ne estas kandelfesta, kaj ankoraŭ malpli ofendi dion antaŭ la infanoj kaj antaŭ la pastro.

-Ĝuste ni ja estas bestoj, kiam ni eĉ anatŭ pastroj ne povas nin deteni! Sed kial ni bojas se ili ne aŭdas nin? – aldonis Manlamulo.

Estis ion dirintaj ankoraŭ Traserĉulo, Nazkataro kaj Hokstango, sed la pastro ne interparolis kun la stalisto kaj ilin ne aŭskultis.

-Ti-el! – diras frat'-Brne levinte la vinglason al la okulo. – Ĉu tiu ĉi estas malnova vino, aŭ la nova, nu, Jeronimo?

-Jes, la malnova... ne, sed la nova...ĝi estas nek la mal- nek la nova! – respondis la estro Hirtulo, tiom li estis konfuzita per riproĉoj de la frataranoj.

-Nu kiel – diris Brne – nek la mal- nek la nova? – kaj ne ĝisatendinte respondon, li eltrinkis la glason kaj lasis ĝin antaŭ Stefanon.

-Jen vidu kiel. Restis al mi kvin siteloj de la pasintjara, kaj, ĉar ĝia prezo malaltiĝis antaŭ la vinberrikolto, mi miksis ĝin kun la nova; jen de la nova mi ekhavis dektri sitelojn, kaj la tuton mi enverŝis en ĉi barelegon; tiu barelego enhanceblas pli ol 18 sitelojn kaj mi...

-Ĉu ĝi ja valoras? – interrompis Vespulino demandante la pastron.

-Je mia fido, ĝi ne malbonas! – respondis Stefano senŝeligonte ovojn.

-Ti-el! kaj ĉu vi donos al la fratoj por malsekigi gorĝojn... ĉu vi vespermanĝis, viroj?

-Jes, jes.

-Ti-el! Nu donu al ili trinki!

-Dankon, dankon.

Hirtulo prenis terkruĉon de antaŭ la infanoj kaj ekiris al la barelego, sed Ronkulo lin haltigis.

-Ni ne volas ke vi miksu kun tiu rekremento! Neniel!

-Rekremento al ni ankaŭ hejme tro restas! – ekkriis Hokstango.

-Ne, ne! – ekkriis ĉiuj.

Hirtulo sentis sin kvazaŭ abelo estus pikinta lian nazpinton, kaj, supreniginte la vangojn kaj lipharojn kaj minace montrante la dentojn, diris:

-Nu viroj, kial vi bezonas puran vinon. Ene ne estas eĉ du glasoj da rekremento!

-Je mia kruco, enestas preskaŭ la tuta terkruĉo! – diris iu kliniĝinta Dentegulo.

Ĉiuj ekridegis.

Vespulino fortiris la ujon el la mano de la edzo, transversis rekrementon, kaj foriris al la barelego. Ĉiuj enspiris en sin, kaj oni aŭdis kiel la ŝpruco siblas. "Frat'-Trogulo" tiam eltiris iun gazeton, kaj komencis legi.

Hokstango, ricevinte de la bofratino la plenan terkruĉon, leviĝis kaj deprenis la ĉapon.

Ĉiuj leviĝis kaj deprenis la ĉapojn..

La pastro, levante la kapon, diris:

-Stefano, satigu la ĉevalon! Tio plej gravas. Poste tuj ekzorgu pri nia litaĵo!

La servisto eliris, kaj post lin Korpulentulo.

Hokstango ektusis, kiel oni faras volante altiri ies atenton. Kiam tio ne helpis, li alvokis:

-Ho frat'-Brne!

La pastro levis la kapon.

Lia frato tiam komencis:

-Je la sano de via kara bonveneco, samkiel ĉiam estis nia bonpasinteco, ĉar ĝi ĉiam niajn dezirojn kaj niajn animojn elserĉas, ĉar ĝi iras kaj naĝas inter ni pekuloj, ĝuste kiel saĝeco inter virbovoj, por nin serenigi kaj heligi, rozo nia, kiel kandelo tra la incensfumo! Poste, ĝi estu destinita, antaŭ dio, antaŭ caro, antaŭ episkopo, provinca pastrestro, monakejestro, popolo kaj en la alia mondo por via vivo, dum en ĉi tiu por via animo! Poste, samkiel vi ĉirkaŭprenis vin per la sankta ŝnurego, ĉirkaŭprenu plibonigon, embrion, kredon kaj paciencon kaj ĉiun benadon; ĉar la animo ne scipovas kie estas duopo, ĉar je la fino pendas pento kaj preĝado; kaj la destino estas granda, ke vi, rozo nia, estu veninta kiel benheroldo de la virgulino Maria, de Jesuo dolĉa, de Jozefo justa! Poste, kiel Jesuo pistis la diameman serpenton, samtiel li en sian

maldolĉan buŝon metis florbukedon, kaj la malbenita satano verŝis venenon! Kiel estis diligentaj ĉiuj niaj mesistoj, dudektri antaŭ vi, samtiel ili estos post vi! Kaj vi kantojn kantas kaj preĝojn eldiras. Kiel dio ĉionscianta, - ĉar la saĝec', honestec', diamem', pentem', fortec', belec', favorec', animec', ĝojec', humilec', en vi estas kvazaŭ en sako! Kaj poste, kaj poste, nia kara kaj benita, fama, fidela kaj kvieta, kiel vi portadis, fastadis, almozpeditadis, disportadis, malsupren ĝisakve, supren ĝismonte, do, vi per la kapo aŭdas, per la oreloj vidas, kaj subkalkane estas facile al tiu kiu estas piedvestita, kaj en la animo al tiu kiu estas per kruco lavita. Do, ĉiu doloriĝanta kuracigu sin per ĉi-destino, kiel vi, frat'-Brne, kiel ankaŭ tiuj niaj pasintaj pastroj! Do, alvundandara (ĉi-esprimo estas ridiga, sed ne havas apartan signifon, rim. de la trad.), vivu nia fama frat'-Brne!

-Vivu! – ekkriis Jerkoviĉoj.

Kiu tostus kiel li! – diras Ronkulo, kapskuante.

-Neniu kiel li!

-Fi al lia fido, se li estus lerninta, kia saĝulo li fariĝus!

-Mi nur malmulte da vortoj komprenis!

-Sed mi ĝuste neniun!

-Kaj ĉiuj miris tiun paroladon kiun ili ne komprenis, ĉar en parokoj de la s. Frane, se oni tostas al iu klera homo, aŭ se en ia pli grava okazo oni parolas antaŭ pli kleraj homoj, necesas paroli tiel ke la aliaj ne komprenu. Kaj Hokstango estis vera lertulo en tio, tia lertulo ke li mem ne komprenis kion li parolis. Li tiel du-trifoje paroladis en la monakejo, kaj kelkajn fojojn en la urbo okaze de la porkomunumaj elektoj, kaj ĉiam li estis plej multe emociita, poste ĉiuj kiuj lin plej malmulte komprenis.

La paroladinto kliinis la terkruĉon. Ankaŭ en tiu afero li ne estis lasta, ĉar lia gorĝnodo saltadis tra la longa faringo, de la ŝlosilostaj konkavaĵoj ĝis la submentono.

Post la respiro, li ekblovis kaj donis la ujon al la frato Nazsonulo.

-Je via ŝan', pastreto! Estu bonvena! – tostis Nazsonulo kaj, englutinte ne malpli ol la pli juna frato, aldonis la ujon al la parenco Ronkulo Dentegulo.

Ronkulo ja post dek bonaj glutporcioj aligis la ujon al Vespulino, ĉar ĝi estis jam malplena.

-Nu ĉi tio ankoraŭ ne okazis! – diris Hirtulo mallaŭte, tiel ke la plej proksimaj povis lin aŭdi. Manĝegemaj leproj, ili ekkaptis la senkostajon kaj trinkas kiom eble pli bone unu ol la alia: glut', glut', glut'! Kvazaŭ tio estus falinta de la ĉiel'! He, he!

Tiam revenis la servisto portante fojnofaskon, per kiu li plenigis la plej bonan liton. En la domo estis tri litoj, ĉarpentitaj per hakilo el fagoligno, kiaj ili estas en la dalmataj vilaĝoj. Sur la fojnon la servisto sternis plurajn litotukojn, eltiritajn el la dusako, kaj sur tion metis kovrilojn.

Post li eniris Korpulentulo, kiu diskurigiĝis antaŭ la sojlo, rigardante oblikve la onklojn kaj parencojn.

Vespulino ion flustris kun la edzo, kaj plenigis la duan terkruĉon, per kiu laŭviciĝis Traserĉulo, Manlamulo kaj Nazsonulo. Poste la trian, per kiu finis la fraŭloj Murmuruloj kaj Denteguloj.

Stefano ekbruligis cigaron al la pastro kaj reiris.

Jerkoviĉoj komprenis nun ke proksimiĝas la momento en kiu okazos tio ĉirkaŭ kion tuto volviĝis, kaj eksilentinte ekrigardis Hokstangon, kiu kuntiris per fingre la sulkojn surfrunte, por kvazaŭ kunmeti la pensojn.

Ĉiuj atendis kiu kaj kiel la unua ekparolos.

La unua ekparolis la servisto Stefano:

-Diaj viroj, kiel ja vi estas krudaj! Tiu via tabako, malbonodoras, je mia fido, kiel lepro, kaj pikas okulojn, tiel ke oni devos tutmalfermi la pordon kaj fumtubon post via eliro! Diaj viroj, kiel krudaj vi estas!

Je tio oni ekmoviĝis, sed la saĝa Hokstango tuj reparolis:

-Ja kiaj se ne krudaj! Ni estas, fraĉjo, kiel sovaĝbestoj!

Poste li estingis la pipon, kion ankaŭ la ceteraj tuj faris.

-Kaj ankoraŭ ion – daŭrigis Stefano. –Ni foriris el la monakejo tagmeze, pro kio, miadie, la pastro estas laca kaj enlitiĝus, sed vi plusidegas.

Je tio ĉiuj samtempe leviĝis.

La pastro ekrigardis al sia horloĝo kaj mansvingis al ili, sed ĉar li tiumomente malfermegis la buŝon oscedante, ĉiuj haltis.

-Restu... anko-raŭ i..om, ankoraŭ iom!

Ili residiĝis.

-Ti-el! Kaj kia estas nun ĉi... ĉi...? – ree la oscedo interrompis ja lian parolon, sed ĉiuj komprenis kion li demandis, ĉar li rigardis Korpulentulon.

Vespulino rapide leviĝis, klinis sin, alzonigis la manojn, kaj komencis:

-Je mia animo, frat'-Brne, por diri al vi veron, li estis iom arbitra, iom obstina, iom vigla, pli vigla ol la aliaj infanoj, sed tamen lasas sin konsili de antaŭ kelka tempo.

-Hm ti-i-el!

Hokstango grave ektusis, tion faris ankaŭ ĉiuj aliaj.

(daŭrigota)

PAKLENA BIBLIOTEKA

Stražar koji me je vodio zastao je pred jednim vratima u hodniku i pokucao na njih. Sačekao je nekoliko časaka, a onda, kao da je čuo odobrenje da uđemo, iako ništa nije doprlo do mojih ušiju, otvorio ih je, propustio najpre mene, pogurnuvši me u leđa, bez reči, pa i sam stupio unutra. Uhvatio me je odmah za rame, kako bi me zadržao, i zatvorio vrata za sobom. Stisak mu je bio nepotrebno čvrst, tim pre što sam se ionako već zaustavio, ne znajući šta drugo da učinim. Ali on valjda i nije umeo blaže da postupa. Ostali smo kraj vrata, očigledno čekajući novu naredbu.

Kao i sve ostalo što sam do sada video na ovom mestu, prostorija u kojoj smo se obreli takođe je bila veoma visoka. Ovde je to izgledalo još izraženije zato što je udaljenost do tavanice bila znatno veća od dužine i širine sobe. Načas mi se javio vrtoglav utisak da bi bilo prirodnije kada bi pod i jedan od bočnih zidova zamenili mesta. Ali, naravno, više nije trebalo računati na prirodne stvari. Njihovo vreme sada je nepovratno minulo. Ko zna kakve me neobičnosti tek čekaju. Morao sam da budem pripravan i na mnogo gore.

Prostorija je bila slabo osvetljena i sasvim oskudno nameštena. S tavanice je na dugačkoj žici visila nejakna sijalica s okruglim, metalnim zaklonom iznad. Glavnina njenog snopa padala je na drvenu stolicu bez naslona, koja je samotno počivala nasred sobe. Uza zid, naspram vrata, stajao je radni sto, gotovo prazan. Čovek koji je sedeo za njim, okrenut leđima zidu, bio je zadubljen u monitor pred sobom, koji ga je zaklanjao ispod ramena. U mutnom sjaju ekrana, koji nije pravio senke, duguljasto lice izgledalo mu je utvarno blede. Imao je kratku, gustu bradu, koja je pri ovoj rasveti delovala prosedo, iako to možda nije bila, i polukružne naočare za čitanje. Bilo je nemoguće odrediti mu godine. Mogao je biti na početku četrdesetih, ali i pri kraju pedesetih.

Činilo se da uopšte nije svestan našeg ulaska. Stražar i ja strpljivo smo stajali pored vrata, nepomični poput dva kipa. Konačno, ne odvajajući oči od monitora, čovek je kratko podigao levu ruku i načinio neodređenu kretnju njome. Ona je, međutim, za stražara imala sasvim jasno značenje. Ponovo me je grubo dohvatio za rame i poveo prema stolici ispod sijalice. Pustio me je tek kada sam seo na nju, ostavši da stoji tik iza mene.

Čekajući na ono što će da usledi, stao sam lagano da klizim pogledom po skučenom vidokrugu pred sobom. Osećanje stešnjenosti koje je izazivala visina prostorije bilo je pojačano jednoličnom obojenošću koja je vladala unaokolo. Neka bolesna sivomaslinasta nijansa prekrivala je sve: zidove, tavanicu, pod, stolicu, sto. Čak je i monitor bio te boje. Farba na zidovima mestimično je bila ispucala i oljuštena, otkrivajući ispod suvi malter boje olujnog neba. Kao da smo se

nalazili unutar prvobitno zelene, ali već odavno izbledele i pohabane kutije za cipele postavljene na najmanju stranu.

Možda bi sve izgledalo manje sumorno da je postojao neki prozor, makar i s rešetkama. Ali nikakvog otvora nije bilo. Raditi na ovakvom mestu moglo je da predstavlja samo kaznu. Osmotrio sam osobu iza monitora uz mešavinu strepnje i sažaljenja. Čak i ako se zanemari sve ostalo, od nekog prinuđenog da ovde dugo boravi svakako se ničemu dobrom nije valjalo nadati.

Gustu tišinu sobe narušilo je iznenadno dobivanje prstiju po tastaturi koju nisam mogao da vidim. Brzo kucanje nije dugo potrajalo. Kada je završio, čovek je podigao glavu, skinuo naočare i odložio ih na sto kraj sebe. Potom je zažmurio i stisnuo palcem i kažiprstom koren nosa. Ostao je u tom položaju nekoliko trenutaka, a onda je otvorio oči i kratko klimnuo stražaru. Čuo sam kako se ovaj udaljava odsečnim korakom. Metalna vrata škripavo su se otvorila, pa zatvorila za njim.

Posmatrali smo se bez reči neko vreme. Osećao sam se nelagodno pod njegovim nemim motrenjem. Ono nije bilo toliko strogo ili preteće, koliko je izražavalo izvesnu odbojnost i zlovolju. Nije bilo teško razabrati da mu se nimalo ne mili predstojeći razgovor sa mnom. Delovao je poput nekoga ko se predugo bavi istim poslom da bi još mogao da nađe bilo kakvu privlačnost u njemu. Viđao sam već taj izraz na licima nekih starijih islednika i sudija. Najzad, čovek je uzdahnuo, prevukao prstima preko visokog čela i prekinuo ćutanje.

"Vi shvatate gde se nalazite, zar ne?" Imao je dubok, otegnut glas.

"U paklu", uzvratio sam posle kratkog oklevanja.

„Tako je. Premda više ne koristimo taj naziv. Svesni ste zašto ste dospeli na ovo mesto?"

Nisam odmah odgovorio. Bilo mi je jasno da nema svrhe da bilo šta prikrivam ili poričem, ali nisam baš morao da okrivljujem samoga sebe. "Mogu da pretpostavim..."

"Možete da pretpostavite?" Ton mu je postao povišen. "Čak se i ovde retko viđa ovakav dosije." Kucnuo je zglibom srednjeg prsta po staklu ekrana.

"Možda bih mogao da pružim neka objašnjenja..."

„Nemojte!" prekinuo me je oštro. „Poštedite me toga, molim vas! Kako su samo neuviđavni svi koji tu sednu. Zar nije dovoljno to što moram da se upoznajem s odvratnostima koje ste počinili, nego biste još hteli i da slušam vaša pritvorna, ljjigava objašnjenja. Od njih mi često više pripadne muka nego od samih zlodela. Uostalom, nema tu šta da se objašnjava. Sve je savršeno jasno. Poznato nam je sve o vama. Svaka sitnica. Zar biste inače bili ovde da nije tako?"

"Događaju se greške." - primetio sam u pola glasa.

"Nema grešaka", odvratio je neumoljivo čovek. „Ali čak i kada bi ih bilo, kasno je da se one isprave. Odavde nema izlaska. Ko jednom dođe, trajno ostaje."

Znao sam to, naravno. Svi to znaju. Pa ipak, morao sam da pokušam još nešto.

"Da li se možda kajanje uzima u obzir?" upitao sam što sam skrušenije umeo.

Ovoga puta nije bilo neophodno da bilo šta kaže. Njegov pogled rečito mi je stavio do znanja šta misli o mom kajanju.

"Nemojte me zamajavati. Nemam vremena za te gluposti. Ne stižem da dignem glavu od posla. Svet još nikada nije bio ovakav. Možete li uopšte da zamislite kakav je teret na mojim plećima?"

Mogao sam to da zamislim, ali kako je pitanje bilo samo retorički postavljeno, slegnuo sam ramenima. Učinilo mi se da je čovek načas poželeo da mi se pojada o svojim tegobama, ali ipak se predomislio.

"Dobro, pustimo sad to. Nije važno. Pređimo na stvar. Moramo da ustanovimo šta bi za vas bilo najprimerenije."

"Kao kazna?", upitao sam obazrivo.

"Mi to nazivamo terapija."

"Gorenje u ognju je terapija?"

"Ko govori o gorenju u ognju?"

"Možda kuvanje u proključalom ulju ili čerečenje..."

"Ne budite vulgarni! Pa nije ovo srednji vek!"

"Izvinite, nisam znao..."

"Naprosto je neverovatno koliko su oni koji dođu ovde opterećeni predrasudama. Mislite li da mi živimo izvan vremena? Da se ovde ništa ne menja? Pa zar bi ovo išlo uz te varvarske svireposti?" Potapšao je sa strane monitor.

"Ne bi, razume se", spremno sam potvrdio.

"Svako doba ima prikladan pakao. Sada je to biblioteka."

Zbunjeno sam zažmirkao. „Biblioteka?"

"Da. Mesto gde se čitaju knjige. Čuli ste za biblioteke? Zašto su svi toliko zapanjeni kad to doznaju?"

"Deluje malo... neočekivano."

"Samo ako se površno posmatra. Ali ukoliko se udubite u stvar, videćete da uopšte nije neobično."

„Nikada ne bih pomislio."

"U stvari, iskreno govoreći, i mi smo u prvi mah bili iznenađeni. Ali ono što nam je kompjuter saopštio bilo je nedvosmisleno. Veoma korisna naprava."

Napravio je pauzu. Proteklo je nekoliko trenutaka pre no što sam shvatio šta se od mene očekuje. „Veoma korisna, svakako", ponovio sam žurno.

"Naročito za statistička istraživanja. Kada smo uneli podatke o svima koji se ovde nalaze, pokazalo se da je osobina koja povezuje daleko najveći broj naših pitomaca, čak 84,12 odsto, odsustvo sklonosti ka čitanju. Kod 26,38 odsto to se još i moglo razumeti. Oni su potpuno nepismeni. Ali šta da se kaže za daljih 47,71 odsto koji, iako pismeni, za

života nisu uzeli u ruke nijednu knjigu, kao da je kužna? Preostalih desetak odsto još je tu i tamo pročitao ponešto, ali bolje da nije jer je to što su čitali bilo potpuno bezvredno."

Odmahnuo sam glavom. „Ko bi rekao?"

Osmotrio me je ispod oka. „Zašto vam to izgleda čudno? Pođite samo od sebe. Koliko ste vi čitali?"

Zamislilo sam se nakratko, upinjući se da se prisetim. „Pa, ovaj, ne baš mnogo, istini za volju."

„Ne baš mnogo? Kazaću vam tačno koliko." Ponovo se začuo zvuk brzog prebiranja po dirkama tastature. "U poslednjih dvadeset osam godina života započeli ste dve knjige. U prvoj ste stigli do polovine četvrte strane, a u drugoj niste odmakli dalje od uvodnog pasusa."

"Nije mi bila zanimljiva", uzvratilo sam tiho, pokajnički.

"Je li? A druge stvari su vam bile zanimljive?"

"Uopšte nisam slutio da je nečitanje smrtni greh."

"I nije. Mada bi svet bio znatno bolji da jeste. Niko još zbog nečitanja nije dopao pakla. Zato nam je stvar i promakla sve do uvođenja kompjutera. Ali kada smo, zahvaljujući njemu, uočili ovu vezu, ukazala se prilika da to iskoristimo. I to višestruko. Moglo bi se, zapravo, reći da je odatle proistekla prava reforma pakla."

"O tome se ništa ne zna."

"Naravno da se ne zna. Kako bi i moglo da se zna? Otuda i sve one predrasude. Iako ovo nikada nije bilo mesto kakvo ljudi uglavnom zamišljaju. Večno mučilište koje vode nemilosrdni sadisti. Da li možda osećate miris sumpora, o kome svi toliko pričaju?"

Omirisao sam vazduh oko sebe. Bio je suv i ustajao, malo plesniv. „Ne", morao sam da priznam.

„Bili smo naprosto zatvor. S nekim posebnostima, doduše, ali režim kod nas nije se u osnovi razlikovao od onoga u vašim zatvorima. Kako ste vi postupali prema zatvorenicima tamo, tako smo i mi ovde. Zašto bismo se razlikovali, uostalom? Ako je ovde bilo surovosti i zlostavljanja, to znači da smo se držali vašeg uzora. Kako su se, međutim, okolnosti kod vas s vremenom poboljšavale, i boravak ovde postajao je podnošljiviji. Toliko, zapravo, da je na kraju zapretila opasnost da se izneveri osnovna zamisao pakla."

„Kako to mislite?"

"Zatvori su odskora kod vas postali gotovo odmarališta. Moglo bi se čak reći hoteli srednje kategorije. Vi to najbolje znate, na kraju krajeva. Proveli ste puno vremena tamo i uopšte vam nije bilo neudobno, zar ne?"

Razmislio sam malo. „Nije, premda hrana nije svuda bila baš najbolja. Naročito desert."

Čoveku iza monitora oteo se kratak uzdah. „Eto, vidite. E, sad, neke povlastice ovde se ipak nisu mogle dopustiti. Odsustvovanje za vikend, na primer. Ili korišćenje mobilnog telefona. Na šta bi to ličilo?"

„Ali to bi znatno olakšalo izdržavanje kazne...”

„Možda. Ne sme se, međutim, izgubiti iz vida da je ovo ipak pakao. I tako, našli smo se u procepu. Više nismo mogli da pratimo liberalizaciju uslova u vašim zatvorima. Zapretila je opasnost da postanemo ono za šta smo odvajkada optuživani: da smo samo oličenje nehumanosti i ugrožavanja ljudskih prava. Srećom, tada smo otkrili ono s nečitanjem.”

"Oprostite, ali ne shvatam kakve to ima veze?"

"Stvar je bila jednostavna. Uveli smo čitanje kao opštu obavezu. Time smo spojili korisno i lepo. Pre svega, omogućili smo našim pitomcima da otklone glavni nedostatak koji ih je doveo ovamo. Da su više čitali, imali bi manje pobuda i vremena za zlodela. Za njih je čitanje prava lekovita blagodet. Zato to i smatramo terapijom, a ne kaznom, iako se možda primenjuje s malim zakašnjenjem. Ali, zapravo, za to nikad nije kasno. A kako se naziva mesto gde svi uživaju u čitanju?"

"Biblioteka?"

Čovek je raširio ruke. "Jasno. A jedna biblioteka poslednja može biti optužena za kršenje ljudskih prava, zar ne? Tako smo ovim potezom ujedno i skinuli krajnje nelagodnu ljagu sa sebe. Štaviše, ispali smo znatno humaniji od vaših zatvora. I u njima postoje biblioteke, razume se, ali šta to vredi kada ih bezmalo niko ne koristi? Kao da ih uopšte nema. Evo, uzmite opet vlastiti primer. Da li ste ijednom makar ušli u biblioteku u nekom od mnogih zatvora u kojima ste bili?"

"Nisam ni znao da ih ima", odvratio sam iskreno.

"Šta sam vam rekao? No, ne sekirajte se, uskoro ćemo vam pružiti priliku da nadoknadite propušteno. I znatno više od toga, u stvari. Pred vama je, u doslovnom smislu, cela večnost čitanja."

Ostao sam nekoliko trenutaka zagledan u čoveka, bez reči. „To je, dakle, moja kazna? Da čitam?"

"Terapija."

"Terapija, da. Neće biti ničeg drugog?" Pokušao sam da suzbijem prizvuk olakšanja u glasu, ali nisam uspeo.

„Neće, naravno. Sedećete lepo u svojoj ćeliji i čitati. To je sve. Nećete imati više nijednu obavezu. Moram, međutim, da vam skrenem pažnju na to da je večnost veoma dugo vreme. Čitanje bi moglo jednoga časa da vam dosadi. To se događa mnogim našim pitomcima i tada postaju veoma domišljati. Kakvim samo trikovima ne pribegavaju da ostave utisak da čitaju, iako to ne čine. No, mi imamo načina da prozremo sve te lukave smicalice. U tim slučajevima moramo, nažalost, da primenjujemo sredstva prinude kako bismo ih privoleli da se vrate čitanju. Kod najupornijih i najtvrdoglavijih ona su ponekad prilično bolna, bojim se."

"A ljudska prava? Humanost?"

"U to uopšte ne diramo. Ovo je isključivo za njihovo dobro. Ne smemo dopustiti da zbog duhovne lenjosti naude sebi, zar ne?"

"Valjda", uzvratio sam, ne baš sasvim ubeđen.

"To je ono osnovno što treba da znate. Već ćete se saživeti s ovdašnjim uslovima. U početku će vam verovatno biti malo teže, dok se ne naviknete, ali konačno ćete uvideti da čitanje pruža neuporediva zadovoljstva. Svi to uvide, tokom večnosti, neko ranije, a neko kasnije. Nadam se da ćete se u međuvremenu ponašati zrelo i trezveno i da nas nećete nagoniti na mere prisile. Tako će svima biti prijatnije i lakše."

Kako se moja bespogovorna saglasnost očito podrazumevala, zaklimao sam glavom. Uglovi čovekovih usana prvi put su se malo povili nagore, obrazujući izvestan prisenak osmeha.

"U redu. Da vidimo na kraju koja bi vam terapija najviše pogodovala. Koju vrstu štiva biste najradije čitali?"

Pitanje je bilo teško, tako da nisam odmah odgovorio. "Detektivske romane, možda", rekao sam najzad, poluupitnim tonom.

"A, to nipošto!" žustro je odvratio čovek, namrgodivši se opet. "Pa to bi bilo kao da bolesniku dajemo otrov umesto leka. Ne, vama je potrebno nešto sasvim suprotno. Nešto blago, čedno, oplemenjujuće. Pastoralna dela, recimo. Da, to je pravi izbor za vašu dušu. Idila. Često je prepisujemo. Ima uistinu čudotvorno dejstvo."

Izgleda da je na mom licu pročitao nešto što mu se možebiti učinilo kao izraz gađenja. Kada je ponovo progovorio, glas mu je povratio prvobitnu oštrinu.

"Ako vam se ovo možda čini kao nepravda, neka vam kao uteha posluži saznanje da bih ja dao sve da mogu da se nađem na vašem mestu. Da uživam u idili. Makar malo. Ali ne mogu, nažalost. Nije mi to dato. Umesto toga, prinuđen sam da čitam isključivo gadosti i niskosti koje naprosto kuljaju odavde. Kao voda iz provaljene brane." Potapšao je opet monitor, ovoga puta odozgo. "A večnost za mene ne traje ništa kraće nego za vas. To je nepravda. Kad god zapadnete u krizu, pomislite samo koliko vam zavidim, i biće vam lakše."

Začutao je. Neskladna visina i turobna obojenost sobe kao da su se najednom sručile na njega, izobličivši mu lice u masku gnušanja i beznađa. Držao je oči još kratko na meni, sve praznijeg pogleda. Pre no što je posegao za naočarama i ponovo ih stavio, podigao je glavu prema vratima iza mene. Ništa nije kazao, ali ona su ipak odmah zaškripala. Čvrsta stražareva ruka ubrzo mi se opet našla na ramenu. Ustao sam sa stolice ispod sijalice i pošao napolje. Izlazeći, ugrabio sam priliku da još jednom osmotrim čoveka za stolom. Gotovo je sasvim utonuo iza monitora, udubivši se u novi dosije. Trenutak potom vrata su ga zaklonila, a ja sam krenuo sa stražarom niz hodnik, prema mojoj ćeliji, gde je i meni predstojalo dugo čitanje.

INFERA BIBLIOTEKO

Gardisto kiu gvidis min ekhaltis en koridoro antaŭ iu pordo kaj ekfrapis. Li atendis kelkajn momentojn kaj tiam, kvazaŭ li aŭdis aprobon por eniri, kvankam nenio atingis miajn orelojn, malfermis la pordon kaj preterlasis min unue, puŝis min al dorso, senvorte, kaj mem ekmarŝis enen. Li tuj kaptis mian ŝultron por haltigi min tiumomente kaj poste fermis la pordon. Lia premo estis nenecese forta, ĉar mi ankaŭ sen tio jam estis haltinta ne sciante kion alian fari. Ni restis apud la pordo evidente atendente novan ordonon.

Kiel ĉio alia kion mi ĝis nun vidis sur ĉi tiu loko, la ejo en kiu ni troviĝis estis ankaŭ tre alta. Ĉi tie tio aspektis ankoraŭ pli evidenta ĉar la distanco ĝis plafono estis konsiderinde pli granda ol la longeco kaj larĝeco de la ĉambro. Momente mi havis impreson ke estus pli nature se la planko kaj unu el la flankaj muroj interŝanĝus la lokojn. Sed, kompreneble, ne plu estis necese kalkuli pri naturaj aferoj. Ila tempo nun senrevene forpasis. Kiu scias kiaj strangaĵoj min ankoraŭ atendas. Mi devis esti preta eĉ por multe pli malbonaj okazaĵoj.

La ejo estis malbone lumigita kaj tute malriĉe meblita. De la plafono pendis je longa metalfadeno malforta elektra bulbo kun ronda metala ŝirmilo supre. La plejparto da ĝia lumo falis sur la lignan seĝon sen apogilo kiu solece ripozis meze de la ĉambro. Apud la muro, kontraŭ la pordo, staris preskaŭ malplena skribotablo. Homo, kiu sidis ĉe la tablo, turnita dorse al la muro, estis enprofundiĝinta en monitoron antaŭ si, kiu lin vidkaŝis sub la ŝultroj. En la malklara lumo de la ekrano, kiu ne faris ombrojn, lia longforma vizaĝo aspektis fantome pala. Li havis mallongan, densan barbon, kiu dank' al tiu lumo aspektis grizete, kvankam ĝi eble ne estis tia, kaj duonrondajn okulvitrojn por legado. Ne estis eble precizigi lian aĝon. Li povis esti komence de kvardekaj, sed ankaŭ ĉirkaŭ fine de kvindekaj.

Ŝajnis ke li ne estas konscia pri nia eniro. La gardisto kaj mi pacience staris ĉe la pordo, senmovaj kiel du statuoj. Finfine, ne deturnante la okulojn de la monitoro, la homo mallonge levis la maldekstran manon kaj faris nedifinan movon per ĝi. Tiu movo, tamen, havis por la gardisto tute klaran signifon. Li denove brute kaptis min je ŝultro kaj kondukis min al la seĝo sub elektra bulbo. Li lasis min nur kiam mi eksidis sur ĝin, restante stari tuj malantaŭ mi.

Atendente kio sekvos, mi komencis malrapide vagi per rigardo laŭ limigita vidzono antaŭ mi. Sento de mallarĝeco, kiun kaŭzis alteco de la ejo, estis fortigita per uniforma koloro kiu regis ĉirkaŭe. La malsana griz-oliva kolornuanco kovris ĉion: murojn, plafonon, plankon, seĝon, tablon. Eĉ la monitoro havis tiun koloron. Farbo sur muroj kelkloke estis fendiĝinta kaj forfalinta, malkovrante sube sekan morteron kun koloro de tempesta ĉielo. Kvazaŭ ni troviĝis ene de la iam verda kaj jam delonge

paliĝinta kaj eluzita ŝu-skatolo lokigita sur la plej malgranda flanko.

Eble ĉio aspektus malpli morna se ekzistus iu fenestro, eĉ kun kradoj. Sed, ekzistis neniu aperturo. Labori ĉe tia loko povis signifi nur punon. Mi observis la homon malantaŭ la monitoro kun mikso de timo kaj kompatato. Eĉ se oni neglektus ĉion alian, de iu devigata longe restadi ĉi tie, ĉiukaze nenio bona povus esti esperebla...

La densan silenton de la ĉambro ĝenis subita tamburado de fingroj sur klavaron, kiun mi ne povis vidi. Rapida tajpado ne daŭris longe. Fininte ĝin, la homo levis la kapon, deprenis okulvitrojn kaj metis ilin sur la tablon apud si. Poste li fermis la okulojn kaj ekpemis la nazradikon per dikfingro kaj montrofingro. Li restis tiel kelkajn momentojn kaj poste malfermis la okulojn kaj kapsvingis al la gardisto. Mi aŭdis ke li malproksimiĝas per firmaj paŝoj. Metala pordo knare malfermiĝis kaj fermiĝis malantaŭ li.

Ni observadis certan tempon unu la alian senvorte. Mi sentis min malagrabla sub lia silenta observado. Ĝi ne estis tiom severa aŭ minaca, kiom malbonhumora. Ne estis malfacile kompreni ke al li tute ne plaĉas la sekva interparolado kun mi. Li aspektis kiel iu, kiu tro longe okupiĝas pri la sama laboro por eĉ povi trovi en ĝi ian ajn allogecon. Mi jam vidis tian mienon sur vizaĝoj de iuj maljunaj enketaj juĝistoj kaj juĝistoj. Finfine, la homo eksuspiris, pasis per fingroj laŭ la alta frunto kaj ĉesigis la silentadon.

"Vi komprenas kie vi troviĝas, ĉu ne?" Li havis profundan, lantparolan voĉon.

"En infero", mi replikis post mallonga hezitado.

"Tiel estas. Kvankam ni ne plu uzas tiun nomon. Vi konscias kial vi alvenis al ĉi tiu loko?"

Mi ne tuj respondis. Al mi estis klare ke estas sence ion ajn kaŝi aŭ nei, sed mi ne devis ĝuste kulpigi min mem. "Mi povas supozi..."

"Vi povas supozi?" La tono de lia voĉo plialtiĝis. "Eĉ ĉi tie estas malofte videbla ĉi tia dosiero." Li ekfrapis per artikolo de mezfingro sur la ekranvitron.

"Eble mi povus doni iajn klarigojn..."

"Ne!" li interrompis min akre. "Indulgu min de tio, mi petas vin! Kiel ja estas nekomprenemaj ĉiuj, kiuj tien eksidas. Ĉu ne sufiĉas, ke mi devas konatiĝi kun abomenaĵoj, kiujn vi faris, sed vi eĉ volus ke mi aŭskultu viajn hipokritajn kaj mukajn klarigojn. Ili min ofte naŭzas pli ol viaj malbonfaroj. Cetere, ne estas ĉi tie io ajn por klarigi. Ĉio estas komplete klara. Mi scias ĉion pri vi. Ĉiun bagatelaĵon. Ĉu vi, cetere, estus ĉi tie, se ne estus tiel?"

"Okazas eraroj!" – rimarkigis mi duonvoĉe.

"Ne ekzistas eraroj!", neelpeteble respondis la homo. "Eĉ se ili ekzistus, malfrue estas por ilia korektado. De ĉi tie ne ekzistas elirejo. Kiu foje alvenas, daŭre restas."

Kompreneble, mi sciis tion. Ĉiuj scias tion. Tamen, mi devis provi

ankoraŭ ion.

"Ĉu oni eble konsideras penton?" demandis mi maksimume penteme.

Ĉi-foje ne estis necese ke li ion ajn diru. Lia rigardo elokvente sciigis al mi kion li pensas pri mia pentado.

"Vi ne perdu la tempon. Mi ne havas tempon por tiuj stultaĵoj. Mi ne povas levi la kapon pro la laboro. La mondo neniam estis ĉi tia. Ĉu vi entute povas imagi kia ŝarĝo kuŝas sur mia dorso?"

Mi povis tion imagi, sed ĉar la demando estis nur retorika, mi mallevis la ŝultrojn. Mi ekhavis impreson ke la homo pormomente ekdeziris lamenti pri siaj malfacilaĵoj, sed tamen li ŝanĝis la opinion.

"Nu, bone, ni nun lasu tion. Ne gravas. Aliru ni la aferon. Ni devas konstati kio por vi estus la plej konvena."

"Kiel puno?" demandis mi singarde.

"Ni tion nomas terapio."

"Brulado en fajro estas terapio?"

"Kiu parolas pri brulado en fajro?"

"Eble kuirado en bolanta oleo aŭ senmembrigo..."

"Ne estu vulgara! Ni ne troviĝas en Mezepoko."

"Pardonu, mi ne sciis..."

"Simple estas nekredeble kiom tiuj, kiuj alvenas ĉi tien, estas ŝarĝitaj per antaŭjuĝoj. Vi pensas, ke ni vivas ekster la tempo? Ke ĉi tie nenio ŝanĝiĝas? Ĉu ja ĉi tio povus kunekzisti kun tiuj barbaraj kruelaĵoj?" Li flanke frapetis la monitoron.

"Kompreneble, ne", prete mi konfirmis.

"Ĉiu epoko havas konvenan inferon. Nun tio estas biblioteko."

Mi konfuzo fermetadis la okulojn: "Biblioteko?"

"Jes. Loko kie oni legas librojn. Ĉu vi aŭdis pri bibliotekoj? Kial ĉiuj estas tiel konsternitaj eksciante pri tio?"

"Aspektas iom ... neatendita."

"Nur se oni senpripense observas. Sed se vi enprofundiĝas en la aferon, vi vidus ke tio tute ne estas neordinara."

"Neniam mi ekpensus."

"Verdire, sincere dirante, unuamomente ankaŭ ni estis surprizitaj. Sed tio, kion al ni la komputilo komunikis, estis senduba. Tre utila aparato."

Li faris paŭzon. Pasis kelkaj momentoj antaŭ ol mi komprenis kion oni de mi atendas. "Tre utila, ĉiukaze", mi rapide ripetis.

"Precipe por statistikaj esploroj. Kiam ni entajpatis informojn pri ĉiuj kiuj ĉi tie troviĝas, montriĝis ke la eco kiu interligas la plej grandan nombron de niaj internuloj, eĉ 84,12 procentojn, estas foresto de legemo. Ĉe 26,38 procentoj oni eĉ povus tion kompreni. Ili estas tute analfabetaj. Sed kion diri pri aliaj 47,71 procentoj kiuj, kvankam skribosciaj, dumvive ne prenis eĉ unu libron en la manojn, kvazaŭ ĝi estus infekta? El restantaj dek procentoj iuj eble sporade tralegis ion, sed pli bone estus

se ili tion ne estus farintaj, ĉar tio kion ili legis estis tute senvalora."

Mi kapneis. "Kiu dirus tion?"

Li observis min subokule. "Kial tio al vi aspektas stranga? Ekiru nur de vi mem. Kiom multe vi legis?"

Mi pripensis mallonge, penante rememori. "Ja, kion diri, ne tiel multe, verdire."

"Ne tiel multe? Mi diros al vi precize kiom multe." Denove aŭdiĝis tono de rapida serĉelektado sur klavoj de klavaro. "En lastaj dudekok jaroj de via vivo vi komencis legadi du librojn. En la unua vi alvenis ĝis duono de la kvara paĝo, kaj en la dua vi sukcesis forlegi nur enkondukan alineon."

"Ĝi ne estis amuza por mi", mi replikis mallaŭte, konfesante.

"Ĉu? Kaj aliaj aferoj estis interesaj por vi?"

"Mi tute ne antaŭsentis ke nelegado estas mortkulpo."

"Ĝuste, ĝi ne estas. Kvankam la mondo estus pli bona se ĝi estus. Ankoraŭ neniu pro nelegado venis al infero. Pro tio, la afero preteriris nin ĝis enkonduko de komputilo. Sed kiam ni, dank' al ĝi, ekvidis ĉi tiun ligon, montriĝis la ebleco ke ni eluzu tion. Eĉ pluroble. Oni povus, fakte, diri ke el tio rezultis vera reformo de la infero."

"Pri tio oni nenion scias."

"Kompreneble, oni ne scias. Kiel eĉ eblus scii? El tio rezultas ankaŭ ĉiuj tiuj antaŭjuĝoj. Kvankam ĉi tio neniam estis loko kia la homoj imagas. Eterna turmentejo kiun gvidas senkompataj sadistoj. Ĉu vi povas senti odoron de sulfuro, pri kiu ĉiuj tiom rakontas?"

Mi ekflaris la ĉirkaŭan aeron. Ĝi estis seka kaj malfreŝa, iom ŝima. "Ne", mi devis konfesi.

"Ni simple estis malliberejo. Kun iuj specialaĵoj, fakte, sed la reĝimo ĉe ni fundamente ne estis diferenca de la reĝimo en viaj malliberejoj. Kiel vi traktis malliberulojn tie, tiel ankaŭ ni traktis ilin ĉi tie. Kial ni diferenciĝu, cetere? Se ĉi tie okazis kruelaĵoj kaj torturadoj, tio signifas ke ni sekvis vian ekzemplon. Kiel, dume, cirkonstancoj ĉe vi kun la tempo pliboniĝis, tiel ankaŭ la restado ĉi tie fariĝis pli kaj pli tolerebla. Tiom, fakte, ke finfine ekminacis danĝero ke oni perfidu bazan koncepton de infero."

"Kiel vi pensas?"

"Malliberejoj ekde nelonge ĉe vi fariĝis ripozejoj. Oni povus eĉ diri mezkategoriaj hoteloj. Vi tion, finfine, plej bone scias. Vi pasigis konsiderinde longan tempon tie kaj al vi tute ne estis malkomforte, ĉu ne?"

Mi pripensis mallonge. "Ne, kvankam nutraĵo ne estis ĉie ĝuste la plej bona". Precipe deserto."

La homo malantaŭ la monitoro mallonge eksuspiris. "Jen, vidu. Kaj nun, iuj privilegioj ĉi tie tamen ne povis esti permesitaj. Forestado por semajnfino, ekzemple. Aŭ uzado de poŝtelefono. Kiel tio aspektus?"

"Sed tio konsiderinde faciligus eltenadon de la puno..."

"Eble. Oni ne rajtas, dume, perdi el vido ke ĉi tio tamen estas infero. Kaj tiel, ni ektroviĝis en fendo. Ekminacis danĝero ke ni fariĝu tio pro kio

oni nin ĉiam kulpigadis: ke ni estas pura personiĝo de nehumaneco kaj minacado de homaj rajtoj. Feliĉe, tiam ni malkovris nelegadon."

"Pardonu, sed mi ne komprenas kiun rilaton tio havas?"

"La afero estis simpla. Ni enkondukis legadon kiel ĝeneralan devon. Tiel ni kunligis belon kaj utilon. Antaŭ ĉio, ni ebligis al niaj internuloj ke ili forigu ĉefan mankon, kiu ilin venigis ĉi tien. Se ili pli multe estus legintaj, ili havus malpli multe da motivoj kaj tempo por malbonagoj. Por ili la legado estas vera saniga favoro. Tial ni opinias ke tio estas terapio kaj ne puno, kvankam oni eble tion aplikadas kun ioma malfruo. Sed, fakte, por tio neniam estas malfrue. Kaj kiel nomiĝas la loko kie ĉiuj ĝuas la legadon?"

"Biblioteko?"

La homo etendis la brakojn. "Klare. Sed biblioteko povas esti nur laste kulpigita pro rompo de homaj rajtoj, ĉu ne? Tiel ni per tiu ago samtempe deprenis de ni tre malagraban riproĉindaĵon. Eĉ ni iĝis pli humanaj ol viaj malliberejoj. Ankaŭ en ili ekzistas bibliotekoj, kompreneble, sed kion tio valoras, se preskaŭ neniu ĝin uzas? Kvazaŭ ili entute ne ekzistus. Jen, prenu vian propran ekzemplon. Ĉu vi almenaŭ unufoje eniris en bibliotekon en iu el multaj malliberejoj en kiuj vi restadis?"

"Mi eĉ ne sciis ke ili ekzistas", mi respondis sincere.

"Kion mi diris al vi? Sed, ne zorgu, baldaŭ ni donos al vi okazon kompensi la preterlasitan. Kaj multe pli ol tio, fakte. Antaŭ vi estas, laŭvorte, tuta senfino de legado."

Kelkajn momentojn mi staris fiksrigardante la homon, senvorte. "Tio estas, do, mia puno? Ke mi legadu?"

"Terapio."

"Terapio, jes. Ekzistos nenio alia?" Mi provis sufoki la tonon de malplistreĉo en la voĉo, sed mi ne sukcesis.

"Kompreneble, ne. Vi bele sidos en via karcero kaj legados. Tio estas ĉio. Vi ne havos eĉ ian ajn alian devon. Mi devas, dume, vin atentigi ke la eterneco estas tre longa tempo. La legado povus foje fariĝi enua por vi. Tio okazas al multaj niaj internuloj kaj tiam ili fariĝas tre inventemaj. Kiajn trukojn ili elpensadas nur por igi impreson ke ili legas, kvankam ili tion ne faras. Sed ni havas manierojn por diveni ĉiujn tiujn ruzajn trukojn. En tiuj kazoj ni devas, bedaŭrinde, aplikadi rimedojn de perforto por konsentigi ilin reveni al legado. Ĉe la plej persistaj kaj obstinaj, tiuj estas kelkfoje tre dolorigaj, mi timas."

"Kaj homaj rajtoj? Humaneco?"

"Tion ni ne tuŝas. Ĉi tio estas ekskluzive por ilia bonstato. Ni ne povas permesi ke pro ilia spirita mallaboremo ili malutilu al si, ĉu ne?"

"Verŝajne", mi replikis, ne tute konvinkite.

"Tio estas baza kion vi devas scii. Vi jam al kutimiĝos kun ĉi tieaj kondiĉoj. Komence al vi probable estos pli malfacile, ĝis kiam vi al kutimiĝos, sed finfine vi ekkomprenos ke la legado donas nekompareblajn plezurojn. Ĉiuj tion ekkomprenas, dum eterneco, iu pli

frue kaj iu malpli frue. Mi esperas ke vi intertempe kondutos maturece kaj sobre kaj vi ne devigos nin al perfortaj agoj. Tiel al ĉiuj estos pli agrable kaj pli facile. "

Ĉar mia senkontraŭdira konsento evidente subkompreniĝis, mi kapklinis. La lipanguloj de la homo unuafoje iomete fleksiĝis supren, farante ian duonombro de rideto.

"En ordo. Ni vidu fine kiu terapio por vi estus la plej konvena. Kiun specon de tekstoj vi plej volonte legus?"

La demando estis malfacila, tiel ke mi ne tuj respondis. "Detektivajn romanojn, eble", mi diris fine, per duondemanda voĉo.

"Ne, tio tute ne!" vigle replikis la homo, denove kuntirante la brovojn. "Ja, tio estus kvazaŭ ni al malsanulo donus venenon anstataŭ medikamento. Ne, vi bezonas ion tute kontraŭan. Ion mildan, ĉastan, nobligan. Pastoralajn verkojn, mi dirus. Jes, tio estas vera elekto por via animo. Idilio. Ni multfoje ĝin preskribas. Ĝi havas vere miraklofaran efikon."

Ŝajnas ke li en mia vizaĝo vidis ion, kio al li eble ŝajnis esprimo de naŭzo. Kiam li denove ekparolis, lia voĉo rericevis komencan akrecon.

"Se al vi ĉi tio eble aspektas maljusteco, kiel konsolo ekservu al vi la ekscio ke mi donus ĉion, se mi povus troviĝi je via loko. Ke mi ĝuu idilion. Almenaŭ iomete. Sed mi ne povas, bedaŭrinde. Tio ne estas destinita al mi. Anstataŭ tio, mi devas legadi ekskluzive fiaĵojn kaj malnoblaĵojn kiuj simple torentadas de ĉi tie. Kvazaŭ akvo tra rompita kluzo." Li ekfrapetis denove la monitoron, ĉi-foje de supre. "La eterno por mi tute ne daŭras malpli longe ol por vi. Tio estas maljusta. Kiam ajn vi falos en krizon, vi nur pripensu kiom mi envias vin kaj vi sentos vin malpli pene."

Li eksilentis. Malharmonia alteco kaj malgajiga koloreco de la ĉambro kvazaŭ subite falis sur lin, ŝanĝinte lian vizaĝon en maskon de naŭzo kaj senespero. Li pluobservis min ankoraŭ mallonge, per pli kaj pli malplena rigardo. Antaŭ ol etendi la manon por preni okulvitrojn kaj remeti ilin, li levdirektis la kapon al la pordo malantaŭ mi. Li nenion diris, sed ĝi tamen tuj ekknaris. Forta mano de la gardisto baldaŭ denove troviĝis sur mia ŝultro. Mi leviĝis de sur la seĝo sub la elektra bulbo kaj ekiris eksteren. Elirante, mi kaptis okazon por ankoraŭ foje ekrigardi la homon malantaŭ la tablo. Li preskaŭ komplete foriĝis malantaŭ la monitoro, koncentriĝante al nova dosiero. Post momento la pordo kaŝis lin kaj mi ekiris kun la gardisto tra koridoro, al mia karcero, kie ankaŭ min atendis longa legado.

Tradukis: Dimitrije Janičić

Jubileoj

Ivo Andrić

EKSTRADICIO DE RIGAS FEREOs

- Okaze de la 250-jaroj de la naskiĝo de Rigas –

Grandega kaj gurda aŭstria ŝipo kun malpure bruna velo, kiu malvigle pendis, albordiĝis postagmeze la 9-an de majo 1798 sub la danuba pordego de la beograda urbo. La gardo ĉe la pordego estis plifortigita. Ŝipistoj turkaj, nudpedaj, en larĝaj ŝalvaroj (turka larĝa pantalono) renversitaj ĝis la genuoj, helpis ĉe la elŝipigo.

Dektri tagojn vojaĝis tiu ŝipo malsupren de Danubo, de Vieno ĝis Beogrado. En malluma interno de la ŝipo, kuŝis ok katenitaj grekaj patriotoj, kaj dudek kvar elektitaj soldatoj de la regimento de Spleni, kun la leŭtenanto Lazaro kiel komandanto, gardis tage kaj nokte por ke neniu de katenitaj Grekoj faru sinmortigon kaj por ke oni povu ilin sanajn kaj vivajn kontraŭ kvitanco transdoni al la turka potenco en Beogrado, kiel oni interkonsentis kun aŭstria internuncio kaj reis-efendi Atif Ahmed en Istanbulo.

La plej bonan lokon en la ŝipo okupis la dragumano de la turka delegitaro en Vieno – dika kaj pala Osmanlio, kiu konvojis la ŝipon kaj devis partopreni la transdonon.

Ĉi matene ili ekmoviĝis el la urbo Petrovaradino, albordiĝis en Zemuno kaj tie restis mallonge, dum ili prenis en la ŝipon unu oficiron de Kontumaco kaj interpretiston. Post la tagmanĝo ili ekiris en la beogradan urbon.

La tago estis varmega, kiel somere. Ili navigis malrapide.

La unua descendis de la ŝipo la leŭtenanto Lazaro, maldika kaj ridiga, en la verda uniformo kun la flavaj signoj de la propra regimento ĉirkaŭ la kolo kaj la manikoj, poste malfacile eliris la dragumano de la turka delegitaro, malantaŭ iris servanto kun malnova leda kesto.

Dum ili malsupreniris suben de ligna ponteto, tra la rando de la ŝipo enviciĝis dek kvar soldatoj de la regimento de Spleni. En la mezo de tiu viva, verda kaj flava heĝo estas forlasita unu vakuo, kiel pordo. El la malhelo de la interno de ŝipo en tiu pordo subite aperis kvar soldatoj, post kiuj, kun la tintado de la katenoj, ŝancelirante kaj palpebrumante de postagmeza lumo, eksvarmis ok arestitoj. Poste iris ankoraŭ kvar soldatoj.

Du soldatoj en la fronto de malgranda sekvantaro tenis katenojn, ankaŭ kiel aliaj, du malantaŭe. Tiamaniere tiuj ĉi ok homoj, kiuj estis ligitaj po du, estis envicigitaj ankoraŭ en du laŭlongaj katenoj, kaj neniu el tio povis elsalti.

La komandanto turka de la fortikaĵo, kuris maldekstren kaj dekstren, donis ordonojn kun sibila voĉo, kaŭze de la granda zorgo kaj emocioj; okuloj liaj estis malgajaj kvazaŭ li tuj esploras.

Je momento, la tutan homaron forglutis negranda kaj obskura pordego. Solaj restis la turka patrolo kaj aŭstria soldataro en la ŝipo. Sed ĉiuj ili kiuj malaperis en la pordego post kelka tempo aperis supre en la norda bastiono de la fortikaĵo, kiu jam estis lumigita per la ruĝa brilo de la suno kiu kliniĝis al la okcidento.

Tio estis larĝa kvarangula teraso, elĵetita en la spacon super la Danubo. Ĝi estis libera de tri flankoj, kie oni vidis malplenajn afustojn, kaj de la kvara baziĝis je la fortikaĵa muro el ruĝaj brikoj en kiu estis du pordetoj kaj altaj katenitaj fenestroj.

Tie aŭstraj soldatoj lasis ambaŭ katenojn kaj je la sama momento la tuta taĉmento de turkaj artilerianoj disiĝis je liberaj flankoj de la teraso kiel kompakta balustrado.

De katenitaj homoj tri tuj falis sur la teron, kaj aliaj moviĝadis per malmolaj kruroj kaj manoj, kiom al ili permesis katenoj per kiuj ili estis interligitaj. Kelkaj rigardis ĉirkaŭen dezirante pli bone sciigi kie ili troviĝas, kaj kelkaj rigardis supren de la turkaj soldatoj, en liberajn vastojn kun granda ĉielo en kiu ŝanĝiĝis kaj transverŝis koloroj de silka brilo.

Arestintoj ĉiuj estis civitane vestitaj sed neglektitaj, palaj kaj kun barboj, komplete lacegaj kaj senkuraĝigitaj.

Tiuj du pordegoj ĉiumomente aperigadis kaj tra ili, kun trablovo, elkuradis kaj enkuradis civiluloj, ĉevalgardistoj kaj oficiroj. Emocio ne malgrandiĝis sed progresiĝis. Ĉiuj ion volis kaj serĉis, - komandanto, aŭstria oficiro, interpretisto. Oni atendis peranton kiu devis je la nomo de forestanta veziro ricevi politikajn arestintojn.

Aŭstrianoj rapidiĝis, ĉar ĉiuokaze volis eĉ hodiaŭ fini ĉion por la ekstradicio. La komandanto de la fortikaĵo klarigis ke post la sunsubiro neniu, kiu ne apartenas al la ŝipanaro povas esti en ĉirakuaĵo de la fortikaĵo, ke ankoraŭ forestas la peranto, ke la laboro por la transdono estas grava kaj kompleksa, kaj ke ĉial, la plej bone estas ke la arestintoj restu ĉi tie, je la provizora kvitanco, kaj ke ili tranoktu en Zemuno kaj ke morgaŭ finu la laboron kiel estas bezonate.

Al tio decide kontraŭis la aŭstra oficiro, kaj lin subtenis la interpretisto de la turka delegitaro. Li insultis la komandanton laŭte kaj impertinente, certigante ke ĝis sunsubiro restis pli ol unu horo kaj montrante lumigitan riveron kun ĝiaj insuletoj. La komandanto sidis ĉe la muro, en ombro, kaj respondadis arogante ke li konas la regularon kaj neniu lin instruos kiam la suno subiras.

Disvolviĝis unu el tiuj koleraj kaj neeksplikeblaj turkaj disputoj, kiun interrompis la alveno de peranto. Dolĉa kaj ĝentila homo, li ordonis ke oni tuj alpaŝu al la transdono kaj al la sanitaraj formalajtoj.

Aŭstria ĉefserĝento legis grekajn nomojn en germana pronoco, Turkoj en sia, kaj aresintoj en la greka. Interkompreno fluis malfacile. Malfidelaj Turkoj alvenadis, kun la propra priskribo en la mano, al

unuopaj katenitaj Grekoj kaj fikse rigardis ĉiun el ili samkiel oni aĉetas la brutaron.

Longe daŭris tiu peniga interkompreniĝo pri la katenitaj homoj. Kiam la protokolo estis kunmetita kaj subskribita, la bastiono jam estis tutkovrita de antaŭvespera ombro; sole verdaj insuletoj ĉe Danubo estis ankoraŭ lumigitaj, super ili tremis, kiel oreolo, brila vaporroseto.

Aŭstria leŭtenanto kaj lia sekvantaro leviĝis por iri. La ĉefserĝentoj kolektis aktojn pri la transdono kaj enfermis ilin en la nigran ujon de lado. En tiu momento en la malhela amaso de katenitaj arestintoj leviĝis akra voĉo:

- Sinjoro leŭtenanto! - parolis Rigas Velestinlis, blonda larĝŝultra homo kun larĝa leona vizaĝo, parolis en la korekta germana lingvo, akre.

- Sinjoro leŭtenanto, vi estas la lasta homo el la eŭropa klerigista mondo kiun ankoraŭ je unu momento ni rigardas per niaj okuloj. Vi havis malenvieman funkcion nin alvenigi ĉi tien. Forportu nian mesaĝon al tiu via „civiliza“ mondo: Hontu ĝi pro tiu ege hontema agmaniero kun ni!

Li parolis rapide, kiel parkere, emocie, kiel ĉiu parolo estas sankta formulo el kiu ĝermas ago. Liaj okuloj febrosolve brilis, elsvingis per la dekstra mano, kiom al li permesis la kateno, jen kunmetante jen diskunmetante la pungon.

Kion deziras tiu stultulo? Silentigu lin, mi petas! – turniĝis leŭtenanto fulmine al ĉefserĝento.

Sed la paroloj svarmis. Rigas Fereos parolis fulmorapide, kiel se la savo lia dependus de tio, ĉu li eldiros ĉion?

Jes, anstataŭ nin mortigi kiel homojn en Vieno, vi nin mizantropie transdonis al la plej malbonaj homoj en la mondo, al niaj malamikoj, por ke ili en turmentoj mortigu nin, surde kaj mizere. Vi ne juĝis al ni, sed vi komercon el ni.

- Silentigu lin, mi diras al vi...

- Estas facile min silentigi. Ni pereos per kruela morto, eble jam en tiu ĉi nokto, sed la honto ne estas en nia malfeliĉo, ĉar la tuta honto restas en vi. Jes, ni pereos, transdonitaj kaj venditaj, kaj vi iru, liberaj kaj feliĉaj, en vian Vienon, servu vian caron, preĝu je via Dio, vivu en via „civila“ vivo, sed hontu vi antaŭ la mondo, antaŭ la historio...

- Batu vi impertinentan hundon!

- Nun eĉ turkaj suboficiroj ekvagadis. Alkuris ankaŭ interpretisto kaj ĉefserĝento, sed ili ne sciis kion fari kun ligita homo kiu kriis, kvankam li batis je punoj.

- Tiu honto mordos vin kaj viajn posteulojn.

- Nur du soldatoj sukcesis per kolboj lin silentigi. Antaŭ ol ili batfalis lin, ankoraŭ foje li ekkriis, sed ne plu iun nedefinitan parolon, sed malklaran guturalan sonon, kiel la homo kiu dronas, - kaj li falis inter mortigitajn kamaradojn.

Tradukis d-ro Miodrag Stojanović

STEVAN STRATIMIROVIĆ

Okaze de la 250 jaroj de lia naskiĝo



*P.Đurković: Mitropolit Stevan Stratimirović
(el la kolekto de Joca Vujić)*

Stratimirović naskiĝis en 1757 en familia posedaĵo en Banato, kiun lia familio devena el Hercegovino, kune kun la nobelaro, ricevis por la militservaj meritoj de carino Maria Terezia (1745). Post la finiĝo de la elementa lernejo en sia Kulpino kaj Begeč kaj de gimnazio en Novi Sad, Segedin kaj Vac (1775), Stratimirović studis filozofion kaj juron en Budimo kaj Vieno; teologion li studis private en Sremski Karlovci ĉe arkimandrito Jovan Rajić (1783). Monaĥan rangon li ricevis de mitropolit Mojsije Putnik, kaj 1784 iĝis arkimandrito de monaĥejo Krušedol. En la mitropolita rezidejo li vivis ĝis la 1786, kiam oni elektis lin episkopo de Budimo,

anstataŭ Josif Jovanović Ŝakabenta. En la popol-eklezia sinodo en Timiŝoaro (1790), oni elektis lin mitropolit de Karlovci. Scienca societo en Getingeno elektis lin en 1817 sia regula membro.

Stratimirović estis multmerita por la fondiĝo de Mitropolio en Karlovci (1791) kaj de Teologia lernejo (1797) aŭ eklezia internulejo por senpaga studado de malriĉaj gimnazianoj, de pli posta Stephaneum (1908). Li ordigis kaj kompletigis Mitropolitan bibliotekon en Sremski Karlovci, kie li estigis kaj Fonduson por krei la mitropolitan rezidejon, en kiu poste estis konstruita la hodiaŭa Mitropolita placo (1892). En la eklezia organizaĵo kaj inter pastroj li enkondukis ekzemplan ordon kaj disciplinon. Kaŭze de la certigo ke eklezi-popolaj sinodoj alportas pli da domaĝo ol utilo, dum la periodo de lia 46-jara aŭtokrata mitropolitado, li kunvokis neniun sinodon. Kun eklezia vivo en mitropolio de Karlovci li administris ĉefe sola, saĝe kaj energie. Li kontraŭstaris al klopodoj de Vieno, precipe de absolutista caro Franco I kaj de lia reakcia ministro de eksteraj aferoj, de princo Meternih, pri la unio kaj katolikiĝo de ortodoksaj Serboj. Li malakceptis anstataŭi cirilan skribon per la latina, kaj julianan kalendaron per la gregoriana. Dum *La unua serba ribelo* (1804), li skribis al rusa caro Aleksandro I *La planon por la liberiĝo de serba popolo*. Estis en kontakto kaj korepondadis kun eminentaj reprezentantoj de slavaj scienco kaj literaturo de sia epoko kaj amikiĝis kun Jernej Kopitar.

Helpante en la studado al la talentaj serbaj junuloj ĉe renomitaj eŭropaj universitatoj, je la komenco de la 19-a jarcento en Sremski Karlovci Stratimirović kreis oportunan klerigan atmosferon, kaj pro tio la slavisto Kopitar intencis tie fondi la unuan serban universitaton. Pro la konservado de ortodokseco inter Serboj, Stratimirović en sia nacia kultura politiko fariĝis pli konservativa, pro kio estiĝis la ĉefa kontraŭulo de progresema lingvaj, literaturaj kaj kulturaj reformoj de Dositej Obradović kaj Vuk Karadžić.

Stratimirović estas aŭtoro de pluraj historiaj, filologiaj kaj ekleziaj traktatoj, same kiel didaktaj versoj skribitaj en latina, germana kaj slavoserba lingvoj. La traktatojn oni gardas en la Mitropolita biblioteko de Sremski Karlovci. Vatroslav Jagić kaj Radoslav Grujić publikigis partojn de lia korespondado en pluraj periodaĵoj kaj en la „Arkivo por la historio de Mitropolio de Karlovci”. Liaj plej gravaj verkoj estas: *Enciklopedio de orienta eklezio*, *Destino de cirilaj literoj en aŭstra ŝtato*. *Pri la papo kiel la plej grava balasto por la unueco de la okcidenta kaj orienta eklezioj*, *Geografiaj notoj pri Turkio en la jaroj 1803 kaj 1804*, *Geneologio de la familio Stratimirović*, *Unu poemo en la dialogo pri la ribelo de Karađorđe*.

Stratimirović estas unu el la plej ofte portretitaj serbaj ekleziaj ĉefuloj. Portretojn liajn kaj de lia familio pentris la plej konataj hejmaj artistoj de la 19-a jarcento (P. Đurković, G. Bakalović, S. Petrović, D. Avramović). Liajn nombrajn portretojn en tekniko de oleopentraĵo sur tolaĵo hodiaŭ oni konservas en la Muzeo de la Serba ortodoksa eklezio en Beogrado, en la pinakoteko de “Matica srpska” en Novi Sad, en la Popola muzeo en Beogrado, en Muzeo de la urbo Beogrado, en Vikariejo de la serba ortodoksa eklezio en Timiŝoaro...

Pri la vivo kaj verko de Stratimirović skribis P. Nikolić (1858), D. Ruvarac (1921) kaj S. Dimitrijević (1926).

Tradukis d-ro Miodrag Stojanović

PETAR LUBARDA

Petar Lubarda naskiĝis la 27-an de julio 1907 en Ljubotinj en Montenegro. Li, laŭ sia propra diro, estis serbo. Lia patro nomiĝis Đuro Lubarda kaj la patrino Marija (naskita Vujović). Elementan lernejon li frekventis en Ljubotinj, Cetinje kaj Herceg Novi. Gimnazion li frekventis en Herceg Novi, Split, Sinj kaj Nikšić. Artlernejon en Beogrado li komencis frekventi en la jaro 1925. Unu jaron post tio li iris al Parizo kie li ekspoziciis en Salono de nedependaj (1927). En Parizo li restas ĝis 1932 kaj antaŭ la Dua Mondmilito denove li restas en Parizo unu jaron. Li vojaĝis al Hispanio kaj Germanio. La militon li pasigis kiel militkaptito. De 1946 ĝis 1950 li estis en Cetinje, kie li, kun Milo Milunović, fondis la unuan Artlernejon en Montenegro. Li estis elektita ekstera membro de Serba Akademio de Sciencoj kaj Artoj en 1959 kaj en la jaro 1961 li fariĝas regula membro. Li gajnis multajn gravajn premiojn kaj rekonojn. Li forpasis la 13-an de februaro 1974 en Beogrado.

Adem Jakupović



LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

Okaze de la 90-a datreveno de la morto

Lazaro Ludoviko Zamenhof naskiĝis en Bialystok, nun en Pollando, tiam en la cara rusa regno, la 15-an de decembro 1859. Lia patro Marko Zamenhof estis lingvoinstruisto, la avo ankaŭ estis lingvisto.

Zamenhof jam en frua juneco interesiĝis pri lingvoj. Antagonismo inter la diverslingva loĝantaro donis al li ideon pri internacia lingvo. Zamenhof spertis, ke poloj, germanoj, rusoj, kaj judoj vivas en daŭra interkverelo. Li konstatis, ke la konfliktoj, kiujn li observis, havas diversajn kaŭzojn kaj, ke inter ili ĉefa kaŭzo estas la diverseco de lingvoj. Li opiniis, ke ĉiuj homoj povus vivi sen interkvereloj, se ili komprenus unu la alian. Tiu ideo gvidis lin, jam dum lernado en mezlernejo (liceo), krei internacian lingvon. En la jaro 1878 li jam pretigis sian vizion de la lingvo. La lingvon li nomis *Lingwe Universala*.

Lia patro ne malaprobis strebojn de sia filo. Tamen iuj amikoj timigis lin dirante, ke tiel lia filo ne sukcesos fini studojn. Influita de ili li postulis de sia filo promeson, ke li ne okupiĝos pri internacia lingvo ĝis la fino de siaj studoj. Poste la patro bruligis la manuskripton opiniante ke li tiel gardas sian filon.

Zamenhof de 1879 ĝis 1885 studadis medicinon en la universitatoj de Moskvo kaj de Varsovio. Post la ricevo de kuracista diplomo li laboradis en diversaj urboj. Dume li rekomencis siajn lingvajn laborojn. La bruligo de la manuskripto ne malhelpis tion, ĉar la tutan ideon li havis en la kapo. Kompreneble, nove koncipita lingvo diferenciĝis de la unua. La lingvo estis preta jam en la jaro 1887.

Intertempe, jam post kvarmonata kuracista praktikado, li konvinkiĝis, ke li estas tro impresema vid-al-vid al la suferoj de malsanuloj, precipe de mortantoj, kaj esperante pli bonan vivtenon kiel specialisto, li decidis iĝi okulisto. Li studis tiun fakon en Varsovio kaj en Vieno. Fine de 1886 li komencis la okulistan praktikadon en Varsovio.

En Varsovio li konatiĝis kun Klara Silbernik. Ili baldaŭ gefianĉiĝis. Lia fianĉino ne nur tutkore simpatiis kun la vivcelo de Zamenhof, sed ŝi ankaŭ helpis kune kun sia patro en la realigo de liaj revoj, disponigante la necesan sumon, sian tutan doton, por eldono de la unua libro de la nova lingvo en julio 1887. La libro estis eldonita sub la pseŭdonimo "Doktoro Esperanto". Tio donis al la lingvo ĝian nomon. En aŭgusto de la sama jaro ili geedziĝis.

De tiam Zamenhof senĉese laboris en la sama direkto, kaj dediĉis multan tempon al tradukado de unuarangaj verkoj de la tutmonda literaturo, interalie la tuta "Malnova Testamento", el la hebrea originalo.

El la geedzeco kun Klara naskiĝis du filinoj kaj unu filo; Adamo (1888) kaj Lidia (1904) iĝis fervoraj aktivuloj de la movado. Ankaŭ tri fratoj de Zamenhof estis fervoraj esperantistoj.

Lia tuta vivo, sed precipe la unuaj jaroj, estis kontinua lukto por la vivteno kaj konstanta laboro por lia idealo. La eldonoj de liaj verkoj, korespondado, organizaj laboroj postulis ne nur multan tempon, energion, sed konsumis baldaŭ lian tutan materialan bazon. La okulkuracista praktikado ne rezultis en la esperataj enspezoj. De Varsovio li sola iris al provinca rusa urbeto Ĥerson en 1889, sed post sep monatoj, en 1890 li revenis denove en Varsovion. Dum vana luktado nur liaj ŝuldoj kreskis, kaj li denove transmigris kun sia familio al Grodno. Tie li iom pli bone prosperis, tamen, pro kreskantaj infanoj, post kvar jaroj, en 1897, li denove reiris al Varsovio, kaj tie li vivis ĝis vivofino, en konstanta verkado, tradukado, propagando de Esperanto. Krom tio li havis ankaŭ kuracistajn devojn. Unu el la plej grandaj eventoj estis por li la okazigo de la unua kongreso en 1905 (Boulogne-sur-Mer), kaj lia tiea partopreno. Rezulte de lia senlaca laboro, dum la unuaj naŭ kongresoj Esperanto disvastiĝis en la mondo, kvankam li kaj la movado devis venki enormajn malfacilaĵojn. Li konstante laboris, krom la lingvaj kaj organizaj demandoj, ankaŭ por la paco, homaranismo, revis pri homarunuigo.

Ĝuste tial por li estis granda bato la komenco de la Unua Mondmilito, kiam li ĝuste estis survoje al la mondkongreso en Parizo. Li devis reveturi al Varsovio tra la nordaj landoj. Li jam tiam suferis je kormalsano. Tamen, malgraŭ sia malsano, li ĝis la lasta vivspiro laboris por Esperanto, ĝis sia morto la 14-an de aprilo 1917.

Adem Jakupović



Du eseetoj

Printempo


Oni ne povas imagi pli belan spektaklon ol la ĉiujaran revekiĝon de la eterna naturo. Ĉu ekzistas io pli mirinda ol la malgrandaj verdaj perloj sur la arbobranĉoj, kiuj rapide eksplodetas por fari helverdan vualaĵon kaj malpli helverdan puntaĵon ĉie en la arbaroj kaj ĝardenoj. Krom la ŝatata verda koloro gajigas la homajn korojn ankaŭ blanka kaj rozkolora floretaroj de la fruktoarboj. La smeraldaj herbejoj estas buntigitaj kaj plibeligitaj per multkoloraj diversspecaj floroj. La agrabla, varmeta aero bonodoras kaj feliĉigas la tutan vivantan mondon. De sur la branĉaro de arboj disvastiĝas ĝojplena birdokanto – la plej bela printempa muziko – kiel himno al la renoviĝinta, fidela naturo, kiu ĝis nun neniam trompis, neniam perfidis la vivantojn.

Floroj

Al vi, multspecaj, belegaj floroj, al vi estas dediĉitaj ĉi tiuj laŭdvortoj – konscie kaj tutkore. Ĉar vi, okul- kaj korĝojigaj estaĵoj, akompanas la homon ekde lia naskiĝo ĝis longe post la morto. Ĉu ne ĉirkaŭas jam la novnaskiton floroj donacitaj al ĝia patrino, floroj kies belecon ĝi ankoraŭ ne povas ĝui, sed kies odoron eble senkonscie iomete konjektas? Ekirinte per la unuaj malcertaj paŝoj la infano ĝojkrietante, duonkonscie komencas flari kaj pluki etajn kaj iom pli grandajn diversformajn mirindajn belulinojn silk- aŭ velurvestitajn, en plej allogaj koloroj brilantaj. La juna homburĝono ellernos donaci florojn al siaj proksimuloj por festotagoj, naskiĝdatrevenoj kaj similaj okazoj. Infanoj fariĝos gejunuloj, ekflamos junaj koroj, sentos ardan amon. Ĉarmaj floroj kuniĝos kun plej sinceraj amdeklaroj, aŭ tute anstataŭos ilin kiel plej taŭgaj, plej belaj pruvoj de enamiĝinteco. Novedzinon kaj ŝiajn akompanantinojn oni ne povas imagi sen floroj. En malsanulejon oni kutime portas florojn kaj, ĝenerale, malsanaj parencoj aŭ geamikoj iomete konsoliĝas per ili. Alproksimiĝas la fino de la vivo, jen la morto. La ĵusforpasinto neniam dum sia vivo ricevis tiom da belaj floroj, eĉ grandajn florkronojn, kiel okaze de la enterigo. Eĉ poste oni alportadas florojn sur la tombon – ĝis amo kaj estimo vivos en la koroj de liaj proksimuloj.

Ĉi tiel konstante floroj, tiuj magiaj, delikataj, efemeraj kreitaĵoj akompanadas la homon, al kies ekzistado la ilia tiom mirinde similas.

Agnesa Eremija



Recenzoj

Bonajn dezirojn el Brazilo okaze de unua numero de BVS

INTERESA, RIĈA KAJ UTILA

Mi antaŭe ne konis beogradajn geesperantistojn. Ili estas pliajn milojn da kilometroj malproksime de mi, tamen mi ĉi tiujn tagojn estis amiko kaj konatulo ĉe multaj el ili. Mi nur kiel "Skyp-ano"

interŝanĝis pensojn kun mia korespondamiko Dimitrije, kiu sendis al mi la unuan numeron de Beograda Verda Stelo. Ĝi aperis kiel literatura, informa, dulingva revuo, formato A-5, 52 paĝa. Mi amuzis legante rakontojn, poemojn, tradukojn kaj aliajn tekstojn en ĉi tiu revuo. Tio estas avantaĝo de Esperanto: homoj povas tralegi kaj interparoli kun malproksimaj homoj ne sciante ilian lingvon, sed sciante Esperanton.

"Beograda Verda Stelo" estas modeste preparita revuo. En ĉi tiu numero aperis kelkaj en Esperanto verkitaĵoj: unu rakonto, du poemoj, du tradukitaĵoj, parto de unu romano tradukita el serba lingvo, unu teksto de Horhe Kamaĉo en serba kiu estis tradukita utiligante Esperanton kiel lingvoponto, estis menciita jubileo de Nikola Tesla (sciencisto), Jovan Sterija Popoviĉ (komediografo), S.S. Mokranjac (muzikisto), tre interesa eseo "Ĉu la Esperanto-tradukado estas arto?", recenzoj pri novaj libroj, movadaj informoj, anekdotoj kaj kalendaro de okazontaĵoj en esperanta mondo.

Miaopinie, se la revuo havos la saman tekston en du lingvoj, mi sugestas ke la originala versio kaj la traduko estu unu apud la alia (aŭ unu proksime al la alia, kiel la poemo "Stampo", paĝoj 7-8). Laŭ mi, ju pli da bildoj (aŭ fotoj), des pli alloga kaj bela la revuo fariĝas, do mi sugestas la uzadon de pli da bildoj kun kelkaj tekstoj (mi scias, ke tio estas granda laboro, sed iom post iom – laŭ la ebloj – oni povos "aplikii" tiun sugestion), ekzemple: la sekcio "Movado" povus havi fotojn pri la pasintaj okazoj. La sekcio ĉe paĝo (kiu havas informojn pri venontaj okazoj) povas nomiĝi "Kalendaro", ĉu ne?

Gratulegojn pro la eksterordinara laboro, tre interesa, riĉa kaj utila (se mi havus sufiĉan tempon, mi revuon legus, relegus, rerelegus, ktp...), kaj ke tia laboro daŭre semu Esperanton plene en Serbio kaj donu multajn fruktojn!

Vitor Luiz Rigoti dos Anjos
Brazilo

Informoj

Esperantista kristnaskarbo — la plej granda en la mondo

La lastan 8-an de decembro vespere, en Sanvitorio Latia, teleregita de Nicola Ruggiero (Nikolao Rugjero), prezidanto de Itala Esperantista Junularo, estis muntita la plej granda kristnaskarbo en la mondo. 18.000 metroj da elektraj kabloj kaj 1050 lampoj lumigis monton Samukron. Ĉijare, por honori la eminentan gaston, sur la arba pinto elstaris verda stelo, kaj la kometa vosto memorigis la kolorojn de la Itala flago. La arbo estis videbla de la 18-a ĝis la 24-a horo ĝis la 6-a de januaro, kaj la 31-an de decembro, je noktomeza eksono, la ciferoj de la jaro, kiuj estis en la konstruaĵo, salutis la alvenon de 2007. La arbon oni povis vidi el la aŭtoŝoseo Romo-Napolo je pli ol 30 kilometroj for. En la okazo, Nicola Ruggiero, alportis siajn salutojn al la junaj esperantistoj de Sanvitorio, substrekante, ke tiu arbo, kiel Esperanto, estas la simbolo de paco kaj frateco inter la popoloj. Ĉeestis, krom granda homamaso, la skabeno pri kulturo de la provinco de Frosinono, D-ro Danilo Campanari (Kampanaro), la urbestro de Sanvitorio Latia Vittorio Casoni (Viktoro Kasono), la prezidanto de loka turisma instanco de Sanvitorio Latia, prof-ino Cornelia Scillia (Kornelia Silio), kaj la redaktistoj de Lazio TV (Latia Televido), kiu rekte elsendis la raportojn dum la vespera teleĵurnalo. Pliaj sciigoj pri la evento estas en la retejo www.prolocosanvittore.it. Baldaŭ la retejo havos ankaŭ la paĝojn en Esperanto. (informo laŭ Giuseppe Valente INFORMITALE 97 Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio)

Adem Jakupović

Libro kun resumo esperanta

Fine de januaro 2007 en beograda eldonejo "Interpres" aperis libro **"Brilo de guzloj"** (Sjaj gusala) de aŭtoro Mirko Dobričanin. La libro aperis okaze de datreveno de beograda Societo de guzlistoj "Vuk Karadžić". Membroj de la Societo kaj ĉiuj kiuj ŝatas eposajn poemojn kaj nacian muzikinstrumenton guzlon, salutis aperon de ĉi tiu libro. La libro enhavas historion de tiu nacia instrumento kaj 35-jaran historion de la Soceto de guzlistoj.

La libro 250-paĝa enhavas resumon en Esperanto kaj angla lingvo.

Dimitrije Janičić

Dimitrije Janičić laŭreato de Liro-2006

En la literatura konkurso *Liro-2006*, publikigita en la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* (temas, kompreneble, pri la pasintjara januaro), Dimitrije Janičić laŭreatiĝis en la branĉo *Originala poezio* pro poemo *Ripetita renkontiĝo*, kvankam unue oni publikigis informon ke laŭreatiĝo estas pro poemo *Mateno*. La eraro estis sufiĉe rapide korektita (la informon pri la eraro sendis s-anino Halina Gorecka), kaj ni nun informas pri la laŭreatiĝo.

Adem Jakupović

Ĉu oni povas kontraŭstari la anglan lingvon?

Samideano Aloísio Sartorato el Brazilo sendis jenan informon (teksto estas originala, neŝanĝita):

Estimataj:

Hieraŭ la brazilaj gazetoj disanoncis ke la usona prezidento Bush ĵus asignis miliardon da dolaroj por helpi latinamerikajn landojn.

Tamen estas notinda la fakto ke 75 milionoj da dolaroj, el tiu miliardo, estas destinita "por ebligi al junaj latinamerikanoj studi la anglan kaj iam povi daŭrigi sian studadon pri tiu lingvo en Usono".

Nur por komparo: la tuta jara buĝeto de la ĉefa monda E-organizaĵo, UEA, estas sub 1 miliono da dolaroj, dum la usona registaro disponigas en la daŭro de tri jaroj la grandegan sumon de 75 milionoj da dolaroj nur por la disvastigo de la angla lingvo. Ĉu necesas aldoni ion pli?

Fakte la defio al la esperantistoj estas giganta: ŝanĝi mondan lingvan ordon ekzistantan antaŭ jarmiloj, t.e., la leĝo de la plej forta. Nia batalo ŝajnas tiun de Davido kontraŭ Goljato. Ĉu valoras la penon?

Al la redakcio sendis: Dimitrije Janičić

ESPERANTO LINGVO DE PACO EN BURUNDO-AFRIKO

La libro "**Esperanto lingvo de paco en Burundo-Afriko**" de konata esperantistino Tereza Kapista el Beogrado estis prezentita la 15-an de marto en urbeto Ĉelinac (Ĉelinac) apud Banja Luka. La organizantoj estis la urba E-societo "La Mondo" el Banja Luka kaj Centro por kulturo kaj sporto el Ĉelinac. Pri la libro kaj aŭtoro parolis prof. dr Miodrag Živanović, mag-o Mićo Vrhovac, prezidanto de E-societo "La Mondo" kaj Sveto Preradović.

La libro "Esperanto lingvo de paco en Burundo-Afriko" estiĝis kiel frukto de Internacia Studseminario de s-ino Tereza en Burundo-Afriko, organizita de UEA kaj Fondaĵo Hans el Amsterdamo. La studseminario estas agnoskita de UNESCO kiel unu el la projektoj farataj en kadro de la Jardeko por Kulturo de Paco 2000-2010 de UNESCO kaj Unuiĝintaj Nacioj.

"Unue mi estis en Irano kie mi instruis Esperanton al rifuĝintoj el Afganujo. Poste ili sendis min al Afriko en Burundo kie mi instruis Esperanton al 168 kursanoj, mezlernejoj kaj instruistoj" – diris s-ino Tereza.

La libro estas skribita laŭ iniciativo de UEA.

La promocion vizitis ĉirkaŭ 50 gelernantoj, profesoroj kaj laboristoj de komunuma administracio. La partoprenantojn de promocio salutis prezidantino de la urba parlamento s-ino Granedina Dragojević.

Pri la promocio informis Radio Ĉelinac, Televideo K3 kaj urba gazeto "Ĉelinaĉke novine" kaj respublika gazeto "Pravda" (Justeco).

En "Ĉelinaĉke novine" kaj "Pravda" aperis longa raporto pri la promocio kaj interparolo kun s-ino Tereza.

En mezlernejo en Ĉelinac la 29-an de marto Mićo Vrhovac prelegis ĝenerale pri Esperanto kaj pri esperantistaj organizoj en la mondo kaj en Bosnio – Hercegovino. Post la prelego s-ro Vrhovac kun profesoroj interkonsentis pri la kurso kiu devis komenci la 11-an de aprilo en mezlernejo.

Miće Vrhovac

Esperanto-kurso

(наставак)

Све именице у есперанту завршавају се на –о:

persono	- особа, лице (личност)	kamarado	- друг
ŝoforo	- возач, шофер	domo	- кућа, дом
sinjoro	- господин	tago	- дан

∴

Граматичког рода нема у есперанту. Постоји само природни (мушки и женски) род.

Женски род добијамо када на корен речи додамо суфикс –in:

ĉino	- Кинез	ĉinino	- Кинескиња
ĉampiono	- шампион	ĉampionino	- шампионка
kliento	- муштерија, клијент	klientino	- клијенткиња
sinjoro	- господин	sinjorino	- госпођа
kamarado	- друг	kamaradino	- другарица
sekretario	- секретар	sekretarino	- секретарица
amiko	- пријатељ	amikino	- пријатељица

Овај суфикс, као и сви други, може се употребити и као засебна реч:

ino - женска, женка

Суфикси су додаци на корен речи, помоћу којих се граде нове речи – изведенице.

∴

Сви глаголи се завршавају на –i у неодређеном начину (као у српском језику):

esti	- бити (јесам)	stari	- стојати, стајати
sidi	- седети	kuŝi	- лежати

∴

Садашње време глагола има наставак –as за сва лица једнине и множине. Према томе:

estas	значи	- (је)сам,	(је)си,	је(ст)
		- (је)смо,	(је)сте,	(је)су

Да бисмо знали о коме је лицу реч, те да ли је једнина или множина, обавезно употребљавамо подмет (именицу или заменицу):

Ĉeko estas papero.	- Чек је папир.
Ŝalo estas objekto.	- Шал је предмет.
Ĵaŭdo estas tago.	- Четвртак је дан.
Hodiaŭ estas ĵaŭdo.	- Данас је четвртак.
Aŭto estas maŝino.	- Ауто(мобил) је машина.
Sinjoro estas persono.	- Господин је особа.
Sinjorino estas ankaŭ persono	- Госпођа је такође особа.

∴

Liĉne zamenice:

mi	- ја	ni	- ми
ci, vi	- ти	vi	- ви
li	- он (за лица)	ili	- они, оне, она
ŝi	- она (за лица)		(за лица, ствари и животиње)
ĝi	- он, она оно (за ствари и животиње)		

Ci је готово сасвим ишчезло. Користимо га само кад желимо да истакнемо облик ти. Уместо њега употребљавамо vi (и за једнину и за множину).

Ĝi се употребљава и за лица само када нам није познат пол, односно природни пол. На пример:

infano	- дете	persono	- особа, личност
--------	--------	---------	------------------

∴

Вежба – Ekzerco

studi	- студирати, проучавати
tempo	- време (календарско)
mono	- новац

Kemio estas stud-objekto. Historio estas ankaŭ stud-objekto. Vojvodino estas regiono. Serbio estas respubliko. Taksio estas aŭto. Violono estas muzik-instrumento.

Пословица – Proverbo: Tempo estas mono.

∴

Ако желимо да изразимо смисао супротан ономе у корену, употребићемо префикс (предметак) **mal-**.

bona	-добар, а, о	malbona	-рђав, лош, а, о
bela	-леп, а, о	malbela	-ружан, а, о
sana	-здрав, а, о	malsana	-болестан, а, о
pura	-чист, а, о	malpura	-прљав, а, о
alta	-висок, а, о	malalta	-низак, а, о
larĝa	-широк, а, о	mallarĝa	-узан, тесан, а, о
longa	-дуг(ачак), а, о	mallonga	-кратак, а, о

malbona cigaredo	-лоша цигарета
malbela fiakro	-ружан фијакер
malsana persono	-болесна особа
malalta nivelo	-низак ниво
mallarĝa vojo	-узан (тесан) пут
mallonga leciono	-кратка лекција
malgranda objekto	-мали предмет

Овај префикс, као и сви остали, може да се употреби као засебна реч:

male -напротив

Префикси су предмети који се стављају испред корена речи и тако граде нове речи – изведенице.

(наставиће се)

Amuzo

Diogeno kaj Aleksandro

La greka saĝulo Diogeno ne havis loĝejon, kiel aliaj homoj, sed li loĝis en malnova barelo. Li diris: „La homo estas des pli feliĉa, ju malpli da bezonoj li havas.“

La reĝo Aleksandro la Granda volis vidi la saĝulon kaj kun granda akompanantaro vizitis lin. Diogeno sidis antaŭ sia barelo kaj sin varmigis en la suno; li tute ne atentis la potencon gaston.

– Via loĝejo estas malbona kaj viaj vestoj ankaŭ – diris Aleksandro, – postulu kion vi volas, mi plenumos vian peton.

– Mi bezonas nenion – respondis la saĝulo, – sed se vi volas fari al mi plezuron, ne kovru al mi la sunon.

La reĝo admiris la noblan, neprofiteman homon kaj diris al siaj akompanantoj:

– Se mi ne estus Aleksandro, mi dezirus esti Diogeno.

Perdita kaj retrovita

Dum festena tagmanĝo malaperis arĝenta kulero. Ĉiuj gastoj volis montri siajn poŝojn, sed la mastro, sprita ruzulo, diris:

– Sinjoroj, ne montru la poŝojn, mi konas certan rimedon por trovi la kuleron; metu viajn kapojn sub la tablon, mi petas vin.

Kiam oni faris tion, li laŭte diris:

– Ĉu ĉiu havas la kapon sub la tablo?

– Jes – estis la unuvoĉa respondo.

– Ankaŭ tiu, kiu ŝtelis la kuleron – demandis rapide la mastro.

– Jes – senpripense respondis la ŝtelinto.

Riĉuloj kaj sciencistoj

Riĉa vantulo demandis scienciston:

– Kial oni ofte vidas literaturistojn kaj sciencistojn en la domoj de riĉuloj, sed malofte riĉulojn en la hejmoj de sciencistoj?

– Ĉar saĝaj homoj – respondis la sciencisto – konas la valoron de la riĉeco kaj la riĉaj ofte ne komprenas la valoron de saĝeco.



92-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Jokohamo, Japanio

de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007

SAT-kongreso okazos en Ecole Centrale, Ĉatenezo-Malabrio (Chatenay-Malabry), Francio. La kongreso okazos inter la 21-a kaj la 28-a de julio 2007.

La 59-a kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) okazos en Parizo, Francio de la 12-a ĝis la 19-a de majo 2007.

La 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-unio okazos en Maribor, Slovenio de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.